

Эта ПАРАЛЛЕЛЬНАЯ КНИГА научит тебя говорить на ЭСПЕРАНТО!

ИСПОЛЬЗОВАНИЕ ЭТОЙ КНИГИ. Тренируйся:

1. Различать на слух речь эсперанто (слушая mp3-запись и видя текст).
2. Читать вслух, вырабатывая привычку правильно говорить на эсперанто
3. Узнавать перевод слов и фраз (из русского текста, не листая словарь).
4. Проверять правильность своего перевода

(Если все эсперанто-слова тебе известны, то закрой листком русский перевод и попробуй без запинки вслух перевести фразы этой книги (а затем, открывая русскую фразу, проверяй свой перевод).

mp3



аудио-книга

ЯЗЫК ЭСПЕРАНТО

Aleksandro Grin SKARLATAJ VELOJ

Tradukis el rusa Jurij Finkel <http://www.esperanto.mv.ru/>

Автор эсперанто перевода Юрий Финкель <http://www.esperanto.mv.ru/>

Параллельный текст Руслан Кокорин ruslanko@hotmail.com

Ferakonto

Al Nina Nikolajevna Grin omaĝas kaj dediĉas la Aŭtoro.

la 23-an de novembro de 1922, Petrogrado.

I. LA ANTAŬDIRO

Longren, matroso de «Oriono», fortika tricient-tuna brigo, sur kiu li servis dek jarojn kaj al kiu li estis ligita pli forte, ol iu filo al propra patrino, devis, finfine, forlasi la servon.

Tio okazis tiel. Dum unu el liaj maloftaj revenoj hejmen li ne ekvidis, kiel ĉiam jam el malproksime, sur la hejma sojlo sian edzinon Mary-n, levantan siajn manojn, kaj poste kurantan renkonten ĝis perdo de la spiro

Anstataŭ ŝi, ĉe infana lito — nova aĵo en la malgranda domo de Longren — staris emociigita najbarino.

— Dum tri monatoj mi vartis ŝin, maljunulo, — diris ŝi, — rigardu al via filino.

Stuporiĝante, Longren klinis sin kaj ekvidis okmonatan estaĵon, koncentrite kontemplantan lian longan barbon, poste eksidis, mallevis la okulojn kaj komencis tordi la lipharon. La lipharo estis malseka, kiel pro pluvo.

— Kiam mortis Mary? — demandis li.

La virino rakontis malgajan historion, intermitante la

РУССКИЙ ЯЗЫК

Александр Грин. АЛЫЕ ПАРУСА

Феерия

Нине Николаевне Грин подносит и посвящает Автор

Пбг, 23 ноября 1922 г.

I ПРЕДСКАЗАНИЕ

Лонгрэн, матрос "Ориона", крепкого трехсоттонного брига, на котором он прослужил десять лет и к которому был привязан сильнее, чем иной сын к родной матери, должен был, наконец, покинуть службу.

Это произошло так. В одно из его редких возвращений домой, он не увидел, как всегда еще издали, на пороге дома свою жену Мери, всплескивающую руками, а затем бегущую навстречу до потери дыхания.

Вместо нее, у детской кровати — нового предмета в маленьком доме Лонгрэна — стояла взволнованная соседка.

— Три месяца я ходила за нею, старик, — сказала она, — посмотри на свою дочь.

Мертвея, Лонгрэн наклонился и увидел восьмимесячное существо, сосредоточенно взиравшее на его длинную бороду, затем сел, потупился и стал крутить ус. Ус был мокрый, как от дождя.

— Когда умерла Мери? — спросил он.

Женщина рассказала печальную историю,

rakonton per karesa kolombumado al la knabino kaj per kredigoj, ke Mary estas en la paradizo. Kiam Longren eksciis detalojn, la paradizo ekŝajnis al li ne multe pli hela ol brulligna ŝedo, kaj li pensis, ke fajro de simpla lampo — se ili estus ĉiuj kune, triope — estus nesuperebla ĝojo por la virino, forpasinta en la nekonatan regnon.

Antaŭ ĉirkaŭ tri monatoj financaj aferoj de la juna patrino estis en tute malbona stato.

El mono, lasita de Longren, preskaŭ duono foriris por kuracado post la malfacila akuŝo, por zorgoj pri sano de la novnaskitino; finfine, perdo de monsumo, negranda, sed necesa por vivo, devigis Mary-n peti Menners-on pruntedoni monon. Menners tenis tavernon, butikon kaj estis opiniata bonhava homo.

Mary ekiris al li je la sesa horo vespere.

Ĉirkaŭ la sepa la rakontantino renkontis ŝin sur la vojo al Liss.

Larmokovrita kaj ĉagrenita Mary diris, ke ŝi iras en la urbon por lombardi la fianĉigan ringon.

Ŝi aldonis, ke Menners konsentis doni monon, sed postulis kontraŭ tio amoron. Mary nenion atingis.

— En nia hejmo ne estas eĉ panero, — diris ŝi al la najbarino. — Mi iros en la urbon, kaj mi kun la knabino iel tenos nin ĝis la edzo revenos.

En tiu ĉi vespero estis malvarma, venta vetero; la rakontantino vane persvadadis la junan virinon ne iri en Liss-on antaŭ nokto. «Vi malsekiĝos, Mary, komenciĝas pluvo, kaj vento, povas esti, alportos pluvegon».

Irado kaj reveno el la apudmara vilaĝo en la urbon konsistigis ne malpli ol tri horojn da rapida paŝado, sed Mary ne obeis la konsilojn de la rakontantino. «Jam sufiĉe mi estis por vi vundo en la okulo, — diris ŝi, — jam estas preskaŭ neniuj familio, kie mi ne prunteprenus panon, teon aŭ farunon. Mi lombardos la ringon, kaj finite». Ŝi iris, revenis, kaj en la sekva tago kuŝis en febro kaj deliro; la malbona vetero kaj vespera pluveto trafis ŝin per ambaŭflanka pneŭmonio, kiel diris urba kuracisto, vokita de la bonkora rakontantino. Post semajno en la duobla lito de Longren restis malplena loko, kaj la najbarino transloĝiĝis en lian domon por varti kaj nutri la knabinon. Por ŝi, soleca vidvino, tio estis nemalfacila. «Krome, — aldonis ŝi, — estus enue sen tia bebeto».

перебивая рассказ умильным гульканием девочке и уверениями, что Мери в раю.

Когда Лонгрэн узнал подробности, рай показался ему немного светлее дровяного сарая, и он подумал, что огонь простой лампы — будь теперь они все вместе, втроем — был бы для ушедшей в неведомую страну женщины незаменимой отрадой.

Месяца три назад хозяйственные дела молодой матери были совсем плохи.

Из денег, оставленных Лонгреном, добрая половина ушла на лечение после трудных родов, на заботы о здоровье новорожденной; наконец, потеря небольшой, но необходимой для жизни суммы заставила Мери попросить в долг денег у Меннерса. Меннерс держал трактир, лавку и считался состоятельным человеком.

Мери пошла к нему в шесть часов вечера. Около семи рассказчица встретила ее на дороге к Лиссу.

Заплаканная и расстроенная Мери сказала, что идет в город заложить обручальное кольцо.

Она прибавила, что Меннерс соглашался дать денег, но требовал за это любви. Мери ничего не добилась.

— У нас в доме нет даже крошки съестного, — сказала она соседке. — Я схожу в город, и мы с девочкой переждемся как-нибудь до возвращения мужа.

В этот вечер была холодная, ветреная погода; рассказчица напрасно уговаривала молодую женщину не ходить в Лисе к ночи. "Ты промокнешь, Мери, накрапывает дождь, а ветер, того и гляди, принесет ливень".

Взад и вперед от приморской деревни в город составляло не менее трех часов скорой ходьбы, но Мери не послушалась советов рассказчицы. "Довольно мне колоть вам глаза, — сказала она, — и так уж нет почти ни одной семьи, где я не взяла бы в долг хлеба, чаю или муки. Заложу колечко, и кончено". Она сходила, вернулась, а на другой день слегла в жару и бреду; непогода и вечерняя изморось сразила ее двухсторонним воспалением легких, как сказал городской врач, вызванный добросердной рассказчицей. Через неделю на двухспальной кровати Лонгрена осталось пустое место, а соседка переселилась в его дом нянчить и кормить девочку. Ей, одинокой вдове, это было не трудно. К тому же, — прибавила она, — без такого несмышлениша скучно.

Longren ekveturis en la urbon, maldungiĝis, adiaŭis la kamaradojn kaj komencis kreskigi la etan Assolon. Dum la knabino ne povis firme paŝadi, la vidvino loĝis ĉe la matroso, anstataŭante por la orfino patrinon, sed tuj kiam Assol ĉesis faladi, levante la piedeton super la sojlo, Longren decide deklaris, ke nun li mem faros ĉion por la knabino, kaj, dankinte la vidvinon pro la helpo kaj kompato, ekvivis per soleca vivo de vidvo, koncentrinte ĉiujn pensojn, esperojn, amon kaj rememorojn al la eta estaĵo.

Dek jaroj da vaga vivo lasis en liaj manoj tre malmulte da mono. Li komencis labori. Baldaŭ en urbaj vendejoj aperis liaj ludiloj — arte faritaj etaj modeloj de boatoj, ŝalupoj, unuferdekaj kaj duferdekaj velŝipoj, krozŝipoj, vaporŝipoj — unuvorte, de tio, kion li proksime konis, kio, pro la karaktero de la laboro, parte anstataŭigis al li bruon de havena vivo kaj pitoreskan laboron de marvojaĝoj. Per tiu maniero Longren akiradis sufiĉe por vivi en kadroj de modera ŝparado. Nekomunikema laŭ sia naturo, li, post la morto de la edzino, iĝis eĉ pli fermita kaj homevitema. Dum festoj oni lin fojfoje vidis en la taverno, sed li neniam eksidadis, sed haste eldrinkadis ĉe la verŝotablo glason da vodko kaj foriradis, mallonge ĵetante flanken «jes», «ne», «saluton», «adiaŭ», «iel-tiel» — al ĉiuj alparoloj kaj salutoj de najbaroj. Gastojn li malŝategis kaj foririgadis ilin ne per forto, sed per tiaj aludoj kaj elpensitaj cirkonstancoj, ke al la vizitanto restis nenio alia, krom elpensi kaŭzon, ne permesantan sidi plu.

Li mem same vizitadis neniun; tiel inter li kaj la najbaroj ekkuŝis malvarma fremdiĝo, kaj se la laboro de Longren — ludiloj — pli dependus de aferoj de la vilaĝo, li pli sentus konsekvencojn de tiaj rilatoj. Varojn kaj provianton li aĉetadis en la urbo — Menners ne povus fanfaroni eĉ pri alumetuĵo, kiun Longren aĉetus de li. Li same faradis mem tutan hejman laboron kaj pacience lernadis la tiom neordinaran por viro arton kreskigi knabinon.

Assol aĝis jam kvin jarojn, kaj la patro komencadis ĉiam pli kaj pli milde rideti, ĵetante rigardojn al ŝia sentema, bonkora vizaĝeto, kiam, sidante sur liaj genuoj, ŝi klopodis super sekreto de la butonumita veŝto aŭ amuze kantetadis matrosajn kantojn — terurajn bru-rimaĵojn. Plenumitaj per infana voĉo kaj ne ĉie kun litero «r», tiuj kantetoj impresis kiel dancanta urso, ornamita per lazura rubandeto. Tiutempe okazis evento, kies ombro, falinta sur la

Лонгрэн поехал в город, взял расчет, простился с товарищами и стал растить маленькую Ассоль. Пока девочка не научилась твердо ходить, вдова жила у матроса, заменяя сиротке мать, но лишь только Ассоль перестала падать, заноса ножку через порог, Лонгрэн решительно объявил, что теперь он будет сам все делать для девочки, и, поблагодарив вдову за деятельное сочувствие, зажил одинокой жизнью вдовца, сосредоточив все помыслы, надежды, любовь и воспоминания на маленьком существе.

Десять лет скитальческой жизни оставили в его руках очень немного денег. Он стал работать. Скоро в городских магазинах появились его игрушки — искусно сделанные маленькие модели лодок, катеров, однопалубных и двухпалубных парусников, крейсеров, пароходов — словом, того, что он близко знал, что, в силу характера работы, отчасти заменяло ему грохот портовой жизни и живописный труд плаваний. Этим способом Лонгрэн добывал столько, чтобы жить в рамках умеренной экономии. Малообщительный по натуре, он, после смерти жены, стал еще замкнутее и нелюдимее. По праздникам его иногда видели в трактире, но он никогда не присаживался, а торопливо выпивал за стойкой стакан водки и уходил, коротко бросая по сторонам "да", "нет", "здравствуйте", "прощай", "помаленьку" — на все обращения и кивки соседей. Гостей он не выносил, тихо спроваживая их не силой, но такими намеками и вымышленными обстоятельствами, что посетителю не оставалось ничего иного, как выдумать причину, не позволяющую сидеть дольше.

Сам он тоже не посещал никого; таким образом меж ним и земляками легло холодное отчуждение, и будь работа Лонгрэна — игрушки — менее независима от дел деревни, ему пришлось бы ощутительнее испытать на себе последствия таких отношений. Товары и съестные припасы он закупал в городе — Меннерс не мог бы похвастаться даже коробкой спичек, купленной у него Лонгрэном. Он делал также сам всю домашнюю работу и терпеливо проходил несвойственное мужчине сложное искусство ращения девочки.

Ассоль было уже пять лет, и отец начинал все мягче и мягче улыбаться, поглядывая на ее нервное, доброе личико, когда, сидя у него на коленях, она трудилась над тайной застегнутого жилета или забавно напевала матросские песни — дикие ревестишия. В передаче детским голосом и не везде с буквой "р" эти песенки производили впечатление танцующего медведя, украшенного голубой ленточкой. В это время произошло событие, тень

patron, kovris ankaŭ lian filinon.

Estis printempo, frua kaj severa, kiel vintro, sed alispeca. Por tri semajnoj al la malvarma tero alpremiĝis akra borda norda vento.

Fiŝistaj boatoj, eltrenitaj sur la bordon, kreis sur blanka sablo longan vicon da malhelaj kiloj, similaj al spinoj de grandegaj fiŝoj. Neniu kuraĝis eliri en la maron en tia vetero. Sur la sola strato de la vilaĝeto oni malofte povus vidi homon, forlasintan sian hejmon; la malvarma kirlovento, fluganta de la bordaj montetoj en vakuon de la horizonto, faris la «liberan aeron» severa torturo. Ĉiuj tuboj de Kaperno fumis de mateno ĝis vespero, taŭzante la fumon laŭ krutaj tegmentoj.

Sed tiuj tagoj de la nordovento ellogadis Longren-on el lia malgranda varma domo pli ofte, ol la suno, kiu ĵetadis en serena vetero sur la maron kaj Kapernon kovrilajn de aera oro. Longren eliradis sur marponteton, sternitan laŭ longaj vicoj da palisoj, kie, sur la fino mem de tiu tabula albordiĝejo, li longe fumadis sian pipon, blovekscitatan de la vento, rigardante, kiel la fundo, nudigita ĉe la bordoj, fumas per griza ŝaŭmo, apenaŭ postsekvanta ondegajn, kies tondra kuro al la nigra, ŝtorma horizonto plenigadis la spacon per gregoj da fantaziaj kolharaj estaĵoj, impetantaj en senbrida fera despero al malproksima konsolo. Ĝemoj kaj bruoj, hurlanta pafado de grandegaj ekflugoj de la akvo kaj, ŝajnis, videbla strio de la vento, vipanta la ĉirkaŭaĵon, — tiel forta estis ĝia glata kuro, — donadis al la elturmentita animo de Longren tiun obtuzon, surdigitecon, kiu, mallevante malfeliĉon al malklara tristo, egalas per sia efiko al profunda dormo.

En unu el tiaj tagoj dekdujara filo de Menners, Hin, rimarkinte, ke la patra boato batiĝas sub la marponto kontraŭ palisojn, frakasante siajn flankojn, iris kaj diris pri tio al la patro. La ŝtormo komenciĝis antaŭnelonge; Menners forgesis eltreni la boaton sur la sablon. Li tuj ekiris al la akvo, kie ekvidis sur la fino de la marponto starantan per la dorso al li fumantan Longren-on. Sur la bordo, krom ili du, estis neniu. Menners trairis laŭ la marponto ĝis la mezo, malleviĝis en la furioze plaŭdantan akvon kaj malligis la ŝkoton; starante en la boato, li komencis moviĝi al la bordo, kaptante palisojn per la manoj. Remilon li ne prenis, kaj en tiu momento, kiam, ŝanceliĝinte, li ne sukcesis kapti vican palison, forta bato de vento ĵetis la pruan de la boato for de la marponto al la oceano. Nun eĉ per la tuta longo de la korpo Menners ne povus atingi la plej proksiman palison. Vento kaj ondoj, balancante, portis la

kotoro, pavŝaja na otca, ukryla i doĉy.

Была весна, ранняя и суровая, как зима, но в другом роде. Недели на три припал к холодной земле резкий береговой норд.

Рыбачьи лодки, повищенные на берег, образовали на белом песке длинный ряд темных килей, напоминающих хребты громадных рыб. Никто не отваживался заняться промыслом в такую погоду. На единственной улице деревушки редко можно было увидеть человека, покинувшего дом; холодный вихрь, несшийся с береговых холмов в пустоту горизонта, делал "открытый воздух" суровой пыткой. Все трубы Каперны дымились с утра до вечера, трепля дым по крутым крышам.

Но эти дни норда выманивали Лонгрена из его маленького теплого дома чаще, чем солнце, забрасывающее в ясную погоду море и Каперну покрывалами воздушного золота. Лонгрэн выходил на мостик, настланный по длинным рядам свай, где, на самом конце этого дощатого мола, подолгу курил раздуваемую ветром трубку, смотря, как обнаженное у берегов дно дымилось седой пеной, еле поспевающей за валами, грохочущий бег которых к черному, штормовому горизонту наполнял пространство стадами фантастических гривастых существ, несущихся в разнуданном свирепом отчаянии к далекому утешению. Стоны и шумы, завывающая пальба огромных взлетов воды и, казалось, видимая струя ветра, полосующего окрестность, — так силен был его ровный пробег, — давали измученной душе Лонгрена ту притупленность, оглушенность, которая, низводя горе к смутной печали, равна действием глубокому сну.

В один из таких дней двенадцатилетний сын Меннерса, Хин, заметив, что отцовская лодка бьется под мостками о сваи, ломая борта, пошел и сказал об этом отцу. Шторм начался недавно; Меннерс забыл вывести лодку на песок. Он немедленно отправился к воде, где увидел на конце мола, спиной к нему стоявшего, куря, Лонгрена. На берегу, кроме их двух, никого более не было. Меннерс прошел по мосткам до середины, спустился в бешено-плещущую воду и отвязал шкот; стоя в лодке, он стал пробираться к берегу, хватаясь руками за сваи. Весла он не взял, и в тот момент, когда, пошатнувшись, упустил схватиться за очередную сваю, сильный удар ветра швырнул нос лодки от мостков в сторону океана. Теперь даже всей длиной тела Меннерс не мог бы достичь самой ближайшей сваи. Ветер и волны, раскачивая, несли лодку в гибельный простор. Сознав положение, Меннерс

boaton en la pereigan vastaĵon. Ekkonsciinte la staton, Menners intencis ĵeti sin en la akvon, por naĝi al la bordo, sed lia decido malfruis, ĉar la boato estis turniĝanta jam apud la fino de la marponto, kie granda profundo de la akvo kaj furiozo de ondegoj promesis certan morton. Inter Longren kaj Menners, tirata en la ŝtorman foron, estis ne pli ol dek klaftoj da ankoraŭ sava distanco, ĉar sur la marponto sub la mano de Longren pendis volvaĵo de ŝnuro kun pezaĵo, enplekita en ties finon. Tiu ŝnuro pendis por okazo de albordiĝo en ŝtorma vetero kaj oni ĵetadis ĝin de sur la marponto.

— Longren! — ekkriis morte terurita Menners. — Ne staru kiel stumpo! Vi ja vidas, mi estas fortirata; ĵetu la ŝnuron!

— Longren silentis, trankvile rigardante al Menners, ĵetiĝanta en la boato, nur lia pipo ekfumis pli forte, kaj li, post paŭzo, elprenis ĝin el la buŝo, por pli bone vidi la okazantaĵon.

— Longren! — kriegis Menners. — Ja vi aŭdas min, mi pereas, savu!

Sed Longren ne diris al li eĉ unu vorton; ŝajnis, li ne aŭdis la desperan kriegon. Antaŭ ol la boato iĝis fortirita tiel malproksime, ke apenaŭ povis alflugi vortoj-krioj de Menners, li eĉ ne movis sian pezon sur la alian piedon. Menners ploregis pro teruro, petegis la matrosan kuri al fiŝistoj, por voki helpon, promesadis monon, minacadis kaj ĵetadis malbenojn, sed Longren nur aliris pli proksime al la rando mem de la marponto, por ne tuj perdi el vido ĵetiĝojn kaj saltojn de la boato. «Longren, — atingis lin obtuze, kiel de sur tegmento — al sidanto en domo, — savu!» Tiam, profunde enspirinte la aeron, por ke ne perdiĝu en la vento eĉ unu vorto, Longren kriis: — Ŝi same petis vin! Pensu pri tio, dum vi ankoraŭ vivas, Menners, kaj ne forgesu!

Tiam la krioj ĉesis, kaj Longren ekiris hejmen. Assol, vekiginte, ekvidis, ke la patro sidas antaŭ la estingiĝanta lampo en profunda medito. Aŭdinte la voĉon de la knabino, kiu vokis lin, li aliris al ŝi, firme kisis kaj kovris per la flankeniĝinta kovrilo.

— Dormu, kara, — diris li, — ĝis mateno estas ankoraŭ malproksime.

— Kion vi faras?

— Nigran ludilon mi faris, Assol, — dormu!

En la sekva tago ĉiuj loĝantoj de Kaperno babiladis nur pri malaperina Menners, kaj en la sesa tago oni alveturigis lin mem, mortantan kaj malicoplenan. Lia

хотел броситься в воду, чтобы плыть к берегу, но решение его запоздало, так как лодка вертелась уже недалеко от конца мола, где значительная глубина воды и ярость валов обещали верную смерть. Меж Лонгреном и Меннерсом, увлекаемым в штормовую даль, было не больше десяти сажен еще спасительного расстояния, так как на мостках под рукой у Лонгрена висел сверток каната с вплетенным в один его конец грузом. Канат этот висел на случай причала в бурную погоду и бросался с мостков.

— Лонгрен! — закричал смертельно перепуганный Меннерс. — Что же ты стал, как пень? Видишь, меня уносит; брось причал!

Лонгрен молчал, спокойно смотря на метавшегося в лодке Меннерса, только его трубка задымила сильнее, и он, помедлив, вынул ее из рта, чтобы лучше видеть происходящее.

— Лонгрен! — взывал Меннерс. — Ты ведь слышишь меня, я погибаю, спаси!

Но Лонгрен не сказал ему ни одного слова; казалось, он не слышал отчаянного вопля. Пока не отнесло лодку так далеко, что еле долетали слова-крики Меннерса, он не переступил даже с ноги на ногу. Меннерс рыдал от ужаса, заклинал матроса бежать к рыбакам, позвать помощь, обещал деньги, угрожал и сыпал проклятиями, но Лонгрен только подошел ближе к самому краю мола, чтобы не сразу потерять из вида метания и скачки лодки. "Лонгрен, — донеслось к нему глухо, как с крыши — сидящему внутри дома, — спаси!" Тогда, набрав воздуха и глубоко вздохнув, чтобы не потерялось в ветре ни одного слова, Лонгрен крикнул: — Она так же просила тебя! Думай об этом, пока еще жив, Меннерс, и не забудь!

Тогда крики умолкли, и Лонгрен пошел домой. Ассоль, проснувшись, увидела, что отец сидит пред угасающей лампой в глубокой задумчивости. Услышав голос девочки, звавшей его, он подошел к ней, крепко поцеловал и прикрыл сбившимся одеялом.

— Спи, милая, — сказал он, — до утра еще далеко.

— Что ты делаешь?

— Черную игрушку я сделал, Ассоль, — спи!

На другой день только и разговоров было у жителей Каперны, что о пропавшем Меннерсе, а на шестой день привезли его самого, умирающего и злобного.

rakonto rapide ĉirkaŭflugis najbarajn vilaĝetojn. Ĝis la vespero Menners-on tiradis ondoj; frakasita per puŝiĝoj kontraŭ la flankojn kaj la fundon de la boato, dum la terura lukto kontraŭ feroco de ondoj, senlace minacantaj elĵeti en la maron la freneziĝintan butikiston, li estis prenita de vaporŝipo «Lukrecia», irinta en Kasset-on. Malvarmumo kaj ŝoko pro la teruro finis la tagojn de Menners. Li travivis iom malpli ol kvardek ok horojn, vokante al Longren ĉiujn malfeliĉojn, eblajn sur la tero kaj en imagoj. La rakonto de Menners, kiel la matroso observis lian pereon, rifuzinte helpon, elokventa des pli, ke la mortanto malfacile spiradis kaj ĝemadis, afekciis la loĝantojn de Kaperno. Ne dirante eĉ pri tio, ke apenaŭ iu el ili kapablis memori ofendon eĉ pli gravan, ol la spertita de Longren, kaj sopiri tiel forte, kiel sopiris li ĝis la fino de la vivo pri Mary, — por ili estis abomena, nekomprenebla, miriga tio, ke Longren silentis. Silente, ĝis siaj lastaj vortoj, ĵetitaj al Menners, Longren staris; staris senmove, severe kaj kviete, kiel juĝisto, montrinte profundan malestimon al Menners — io plia, ol malamo, estis en lia silento, kaj tion ĉiuj sentis. Se li krius, esprimante per gestoj aŭ per malice-ĝoja agitiĝo, aŭ per io alia sian jubilon ĉe vido de la malespero de Menners, la fiŝistoj komprenus lin, sed li agis alie, ol agadis ili — agis impone nekompreneble kaj per tio starigis sin super la ceteraj, unuvorte, faris tion, kion oni ne pardonas. Oni ne plu riverencadis al li, ne manpremadis, ne ĵetadis rekonan, salutatan rigardon. Tute por ĉiam restis li ekster la vilaĝaj aferoj; knaboj, ekvidinte lin, kriadis postsekve: «Longren dronigis Menners-on!». Li ne atentadis tion. Same, ŝajnis, li ne rimarkadis ankaŭ tion, ke en la taverno aŭ sur la bordo, inter boatoj, fiŝistoj eksilentadis en lia ĉeesto, deirante flanken, kiel for de pestulo. La okazo kun Menners firmigis la fremdiĝon, antaŭe neplenan. Iĝinte plena, ĝi kaŭzis firman reciprokan malamon, kies ombro falis ankaŭ sur Assol-on.

La knabino kreskis sen amikinoj. Du aŭ tri dekoj da samaĝaj infanoj, loĝintaj en Kaperno, sorbinta, kiel spongo akvon, krudan familian etoson, kies bazo estis la neŝancelebla aŭtoritato de patrino kaj patro, imitemaj, kiel ĉiuj infanoj en la mondo, elstrekis por ĉiam la etan Assol-on el la sfero de sia favoro kaj atento. Okazis tio, certe, iom post iom, per admonoj kaj skoldoj de plenaĝuloj ricevis karakteron de terura tabuo, kaj poste, fortigita per klaĉoj kaj onidiroj, elkreskis en la infanaj mensoj en timon al la domo de la matroso.

Его рассказ быстро облетел окрестные деревушки. До вечера носило Меннерса; разбитый сотрясениями о борта и дно лодки, за время страшной борьбы с свирепостью волн, грозивших, не уставая, выбросить в море обезумевшего лавочника, он был подобран пароходом "Лукреция", шедшим в Кассет. Простуда и потрясение ужаса прикончили дни Меннерса. Он прожил немного менее сорока восьми часов, призывая на Лонгрена все бедствия, возможные на земле и в воображении. Рассказ Меннерса, как матрос следил за его гибелью, отказав в помощи, красноречивый тем более, что умирающий дышал с трудом и стонал, поразил жителей Каперны. Не говоря уже о том, что редкий из них способен был помнить оскорбление и более тяжкое, чем перенесенное Лонгреном, и горевать так сильно, как горевал он до конца жизни о Мери, — им было отвратительно, непонятно, поражало их, что Лонгрэн молчал. Молча, до своих последних слов, посланных вдогонку Меннерсу, Лонгрэн стоял; стоял неподвижно, строго и тихо, как судья, выказав глубокое презрение к Меннерсу — большее, чем ненависть, было в его молчании, и это все чувствовали. Если бы он кричал, выражая жестами или суетливостью злорадства, или еще чем иным свое торжество при виде отчаяния Меннерса, рыбаки поняли бы его, но он поступил иначе, чем поступали они — поступил внушительно, непонятно и этим поставил себя выше других, словом, сделал то, чего не прощают. Никто более не кланялся ему, не протягивал руки, не бросал узнающего, здоровающегося взгляда. Совершенно навсегда остался он в стороне от деревенских дел; мальчишки, завидев его, кричали вдогонку: "Лонгрэн утопил Меннерса!". Он не обращал на это внимания. Так же, казалось, он не замечал и того, что в трактире или на берегу, среди лодок, рыбаки умолкали в его присутствии, отходя в сторону, как от зачумленного. Случай с Меннерсом закрепил ранее неполное отчуждение. Став полным, оно вызвало прочную взаимную ненависть, тень которой пала и на Ассоль.

Девочка росла без подруг. Два-три десятка детей ее возраста, живших в Каперне, пропитанной, как губка водой, грубым семейным началом, основой которого служил непоколебимый авторитет матери и отца, переимчивые, как все дети в мире, вычеркнули раз — навсегда маленькую Ассоль из сферы своего покровительства и внимания. Совершилось это, разумеется, постепенно, путем внушения и окриков взрослых приобрело характер страшного запрета, а затем, усиленное пересудами и кривотолками, разрослось в детских умах страхом к дому матроса.

Krome, la ferma vivmaniero de Longren liberigis nun histerian langon de klaĉo; pri la matroso oni diradis, ke li ie iun murdis, pro tio, kvazaŭe, oni lin ne plu akceptas servi sur ŝipojn, kaj li mem estas morna kaj homevitema, ĉar lin «ronĝas rimorsoj de krima konscienco». Ludante, la infanoj forpeladis Assol-on, se ŝi alproksimiĝadis al ili, ĵetadis koton kaj mokadis per tio, ke kvazaŭe ŝia patro manĝis homan viandon, kaj nun faras falsan monon. Unu post la alia, ŝiaj naivaj penoj proksimiĝi finiĝadis per amara ploro, batbluaĵoj, grataĵoj kaj ceteraj rivelaĵoj de la publika opinio; ŝi ĉesis, finfine, ofendiĝi, sed plu fojfoje demandadis la patron: «Diru, kial oni nin ne amas?» — «He, Assol, — diradis Longren, — ĉu ili kapablas ami? Necesas kapabli ami, sed ĝuste tion ili ne povas». — «Kio estas — kapabli?» — «Jen kio!» Li levadis la knabinon kaj forte kisadis la malgajajn okulojn, premfermiĝantajn pro la karesa plezuro.

La plej ŝatata amuzo de Assol estis vespere aŭ dum festo, kiam la patro, forŝovinte vazojn kun amelgluo, instrumentojn kaj nefinitan laboraĵon, eksidadis, demetinte la antaŭtukon, por ripozi, kun la pipo en la dentoj, — surgrimpi sur liajn genuojn kaj, turniĝante en gardema ringo de la patra brako, tuŝadi diversajn partojn de ludiloj, demandante pri ilia destino. Tiel komenciĝadis siaspeca fantazia lekcio pri vivo kaj homoj — lekcio, en kiu, danke al la antaŭa vivmaniero de Longren, al hazardaĵoj, al hazardo entute, al miraklaj, mirindaj kaj neordinaraj okazaĵoj estis donata la unua loko. Longren, dirante al la knabino nomojn de ŝnuroj, veloj, rigiloj, iom post iom absorbiĝadis, transirante de klarigoj al diversaj epizodoj, en kiuj rolis jen vindaso, jen rudrorado, jen masto aŭ iu tipo de boato k.t.p., kaj de tiuj apartaj ilustraĵoj transiradis al vastaj bildoj de maraj vagadoj, enplektante superstiĉojn en la realon, kaj la realon — en imagojn de sia fantazio. Tie aperadis kaj tigra katino, la heroldino de ŝippereo, kaj parolanta flugfiŝo, ne obei kies ordonojn signifis perdi la kurson, kaj Fluganta Holandano kun sia furioza ŝipanaro; antaŭsignoj, fantomoj, niksoj, piratoj — unuvorte, ĉiuj fabeloj, kiuj ornamas liberan tempon de maristo dum senventeco aŭ en ŝatata drinkejo. Rakontadis Longren ankaŭ pri anoj de pereintaj ŝipoj, pri sovaĝiĝintaj homoj, forgesintaj parolon, pri misteraj trezoroj, pri ribeloj de punlaboruloj, kaj pri multo alia, kion la knabino aŭskultadis pli atente, ol, eble, oni aŭskultis unuafoje la rakonton de Kolumbo pri nova kontinento. «Nu, parolu plu», — petadis Assol, kiam

К тому же замкнутый образ жизни Лонгрена освободил теперь истерический язык сплетни; про матроса говаривали, что он где-то кого-то убил, оттого, мол, его больше не берут служить на суда, а сам он мрачен и нелюдим, потому что "терзается угрызениями преступной совести". Играя, дети гнали Ассоль, если она приближалась к ним, швыряли грязью и дразнили тем, что будто отец ее ел человеческое мясо, а теперь делает фальшивые деньги. Одна за другой, наивные ее попытки к сближению оканчивались горьким плачем, синяками, царапинами и другими проявлениями общественного мнения; она перестала, наконец, оскорбляться, но все еще иногда спрашивала отца: — "Скажи, почему нас не любят?" — "Э, Ассоль, — говорил Лонгрэн, — разве они умеют любить? Надо уметь любить, а этого-то они не могут". — "Как это — уметь?" — "А вот так!" Он брал девочку на руки и крепко целовал грустные глаза, жмурившиеся от нежного удовольствия.

Любимым развлечением Ассоль было по вечерам или в праздник, когда отец, оставив банки с клейстером, инструменты и неоконченную работу, садился, сняв передник, отдохнуть, с трубкой в зубах, — забраться к нему на колени и, вертясь в бережном кольце отцовской руки, трогать различные части игрушек, расспрашивая об их назначении. Так начиналась своеобразная фантастическая лекция о жизни и людях — лекция, в которой, благодаря прежнему образу жизни Лонгрена, случайностям, случаю вообще, — диковинным, поразительным и необыкновенным событиям отводилось главное место. Лонгрэн, называя девочке имена снастей, парусов, предметов морского обихода, постепенно увлекался, переходя от объяснений к различным эпизодам, в которых играли роль то брашпиль, то рулевое колесо, то мачта или какой-нибудь тип лодки и т. п., а от отдельных иллюстраций этих переходил к широким картинам морских скитаний, вплетая суеверия в действительность, а действительность — в образы своей фантазии. Тут появлялась и тигровая кошка, вестница кораблекрушения, и говорящая летучая рыба, не послушаться приказаний которой значило сбиться с курса, и Летучий Голландец с неистовым своим экипажем; приметы, привидения, русалки, пираты — словом, все басни, коротающие досуг моряка в штиле или излюбленном кабаке. Рассказывал Лонгрэн также о потерпевших крушение, об одичавших и разучившихся говорить людях, о таинственных кладах, бунтах каторжников и многом другом, что выслушивалось девочкой внимательнее,

Longren eksilentadis enpenŝiginte, kaj ekdormadis sur lia brusto kun la kapo, plena de miraklaj sonĝoj.

Same por ŝi estis granda, ĉiam materie grava plezuro aperado de komizo de urba ludila vendejo, volonte aĉetanta laboraĵojn de Longren. Por akiri favoron de la patro kaj elmarĉandi pli, la komizo kunprenadis por la knabino paron da pomoj, dolĉan kuketon, manplenon da nuksoj. Longren ordinare petadis veran koston pro malŝato de marĉando, kaj la komizo malaltigadis la prezon. «Hontu, — diradis Longren, — ja mi dum semajno sidis super tiu boato. — La boato estis ok-cola. — Rigardu, kia firmeco, kaj enakviĝo, kaj kvalito? Jen tiu ĉi dek kvin homojn eltenos en ajna vetero». Ĉio finiĝadis per tio, ke kvieta murmurado de la knabino super sia pomo forprenadis de Longren persiston kaj deziron disputi; li cedadis, kaj la komizo, plenŝtopinte sian korbon per bonegaj, firmaj ludiloj, foriradis, subridante en la lipharojn.

Tutan hejman laboron Longren faradis mem: fendadis lignaĵon, portadis akvon, hejtadis la fornon, kuiradis, lavadis kaj gladadis vestaĵojn kaj, krom ĉio ĉi, sukcesadis labori por akiri monon. Kiam Assol ok-jariĝis, la patro instruis ŝin legi kaj skribi. Li komencis fojfoje prenadi ŝin en la urbon, kaj poste eĉ sendadi ŝin sola, se estis necese ricevi iom da mono en la vendejo aŭ liveri tien la varon. Tio okazadis ne ofte, kvankam Liss situis nur je tri mejloj for de Kaperno, sed la vojo al ĝi iris laŭ arbaro, kaj en arbaro multo povas timigi infanojn, krom fizika danĝero, kiun, verdire, estas malfacile renkonti en tia proksima distanco disde urbo, sed tamen ne malhelpas ĝin atenti. Tial nur en bonaj tagoj, matene, kiam la densejo, ĉirkaŭanta la vojon, estas plena je suna pluvego, floroj kaj silento, tiel ke al la impresemo de Assol ne minacis fantaziaj fantomoj, — Longren forpermesadis ŝin en la urbon.

Foje, meze de tia vojaĝo al la urbo, la knabino eksidis apud la vojo por manĝi pecon de pasteĉo, metita en la korbon por matenmanĝo. Manĝetante, ŝi turnadis la ludilojn; el ili du-tri evidentiĝis novaj por ŝi: Longren faris ilin nokte. Unu tia novaĵo estis miniatura sporta jaĥto; la blanka ŝipeto levis skarlatajn velojn, faritajn el tranĉaĵoj de silko, kiun Longren uzadis por tapeti vaporsĥipajn kajutojn de ludiloj por riĉaj aĉetantoj. Ĉi-okaze, evidente, farinte la jaĥton, li ne trovis konvenan materialon por velo, uzinte tion, kio estis — ŝirpecojn de skarлата silko. Assol ekadmiris. La flama gaja koloro tiel hele brulis

чем может быть слушался в первый раз рассказ Колумба о новом материке. — "Ну, говори еще", — просила Ассоль, когда Лонгрен, задумавшись, умолкал, и засыпала на его груди с головой, полной чудесных снов.

Также служило ей большим, всегда материально существенным удовольствием появление приказчика городской игрушечной лавки, охотно покупавшей работу Лонгрена. Чтобы задобрить отца и выторговать лишнее, приказчик захватывал с собой для девочки пару яблок, сладкий пирожок, горсть орехов. Лонгрен обыкновенно просил настоящую стоимость из нелюбви к торгу, а приказчик сбавлял. — "Эх, вы, — говорил Лонгрен, — да я неделю сидел над этим ботом. — Бот был пятивершковый. — Посмотри, что за прочность, а осадка, а доброта? Бот этот пятнадцать человек выдержит в любую погоду". Кончалось тем, что тихая возня девочки, мурлыкавшей над своим яблоком, лишала Лонгрена стойкости и охоты спорить; он уступал, а приказчик, набив корзину превосходными, прочными игрушками, уходил, посмеиваясь в усы.

Всю домовую работу Лонгрен исполнял сам: колол дрова, носил воду, топил печь, стряпал, стирал, гладил белье и, кроме всего этого, успевал работать для денег. Когда Ассоль исполнилось восемь лет, отец выучил ее читать и писать. Он стал изредка брать ее с собой в город, а затем посылать даже одну, если была надобность перехватить денег в магазине или снести товар. Это случалось не часто, хотя Лисе лежал всего в четырех верстах от Каперны, но дорога к нему шла лесом, а в лесу многое может напугать детей, помимо физической опасности, которую, правда, трудно встретить на таком близком расстоянии от города, но все-таки не мешает иметь в виду. Поэтому только в хорошие дни, утром, когда окружающая дорогу чаща полна солнечным ливнем, цветами и тишиной, так что впечатлительности Ассоль не грозили фантомы воображения, Лонгрен отпускал ее в город.

Однажды, в середине такого путешествия к городу, девочка присела у дороги съесть кусок пирога, положенного в корзинку на завтрак. Закусывая, она перебирала игрушки; из них две-три оказались новинкой для нее: Лонгрен сделал их ночью. Одна такая новинка была миниатюрной гоночной яхтой; белое суденышко подняло алые паруса, сделанные из обрезков шелка, употреблявшегося Лонгреном для оклейки пароходных кают — игрушек богатого покупателя. Здесь, видимо, сделав яхту, он не нашел подходящего материала для паруса, употребив что было — лоскутки алого шелка. Ассоль

en ŝia mano, kvazaŭ ŝi tenis fajron. La vojon estis kruciganta roĵo, kun transĵetita super ĝi palisa ponteto; la roĵo dekstre kaj maldekstre estis foriranta en la arbaron. «Se mi metos ĝin sur la akvon navigi iomete, — pensis Assol, — ĝi ja ne malsekiĝos, mi ĝin poste viŝos». Deirinte en la arbaron trans la ponteton, laŭ la fluo de la roĵo, la knabino gardeme mallevis la ĉarmintan ŝin ŝipon sur la akvon ĉe la bordo mem; la veloj tuj ekbrilis per skarлата speguliĝo en la diafana akvo: la lumo, penetrante la ŝtofon, ekkruŝis per roza radio sur blankaj ŝtonoj de la fundo. «Vi el kie venis, ŝipestro?» — gravmiene demandis Assol imagitan vizaĝon kaj, respondante al si mem, diris: «Mi venis... venis... venis mi el Ĉinio». — «Kaj kion vi alveturigis?» — «Kion mi alveturigis, pri tio mi ne diros». — «Aĥ, vi ne deziras, ŝipestro! Nu, tiam mi vin sidigos reen en la korbon». Ĵus la ŝipestro prepariĝis humile respondi, ke li ŝercis kaj ke li pretas montri elefanton, kiam subite milda kuro de ĉeborda akvostrio turnis la jaĥton per la pruo al la mezo de la roĵo, kaj, kiel reala ŝipo, plenrapide forlasinte la bordon, ĝi glate ekiris malsupren. Momente ŝanĝiĝis la skalo de la vidata: la roĵo ŝajnis al la knabino grandega rivero, kaj la jaĥto — malproksima, granda ŝipo, al kiu, preskaŭ falante en la akvon, timigita kaj konsternita, ŝi estis etendanta la manojn. «La ŝipestro ektimis», — pensis ŝi kaj ekkuris post la forfosantan ludilon, esperante, ke ĝi estos ie ĵetita al la bordo. Haste trenante la ne pezan, sed malhelpantan korbon, Assol ripetadis: «Aĥ, mia Dio! Jen kia okazo...» Ŝi penis ne perdi el vido la belan, glate forkurantan triangulon de la veloj, stumbladis, faladis kaj ree kuradis.

Assol neniam estis tiel profunde en arbaro, kiel nun. Ŝi, absorbata de malpacienca deziro kapti la ludilon, ne rigardis ĉirkaŭen; apud la bordo, kie ŝi kuris, estis sufiĉe da obstakloj, okupantaj la atenton. Muskokovritaj trunkoj de falintaj arboj, kavoj, altaj filikoj, eglanterioj, jasmenoj kaj avelujoj malhelpadis ĉiun ŝian paŝon; traŝirante ilin, ŝi iom post iom perdadis la fortojn, haltante ĉiam pli kaj pli ofte, por ripozi aŭ forviŝi de sur la vizaĝo gluecan araneaĵon. Kiam komencis aperadi, en pli larĝaj lokoj, kareksaj kaj kanaj densejoj, Assol tute perdis el vido la skarlatan brilon de la veloj, sed, ĉirkaŭkurinte sinuon de la roĵo, ŝi ree ekvidis ilin, majeste kaj sencede kurantajn for. Foje ŝi retrorigardis, kaj la arbara maso kun ties bunteco, transiranta de fumaj fostoj de lumo en foliaro al malhelaj fendoj de densa obskuro, profunde afekciis la knabinon. Por momento ektiminte, ŝi denove rememoris pri la

priŝla en voŝiĝe. Пламенный веселый цвет так ярко горел в ее руке, как будто она держала огонь. Дорогу пересекал ручей, с переброшенным через него жердяным мостиком; ручей справа и слева уходил в лес. "Если я спущу ее на воду поплавать немного, размышляла Ассоль, — она ведь не промокнет, я ее потом вытру". Отойдя в лес за мостик, по течению ручья, девочка осторожно спустила на воду у самого берега пленившее ее судно; паруса тотчас сверкнули алым отражением в прозрачной воде: свет, пронизывая материю, лег дрожащим розовым излучением на белых камнях дна. — "Ты откуда приехал, капитан? — важно спросила Ассоль воображенное лицо и, отвечая сама себе, сказала: — Я приехал" приехал... приехал я из Китая. — А что ты привез? — Что привез, о том не скажу. — Ах, ты так, капитан! Ну, тогда я тебя посажу обратно в корзину". Только что капитан приготовился смиренно ответить, что он пошутил и что готов показать слона, как вдруг тихий отбег береговой струи повернул яхту носом к середине ручья, и, как настоящая, полным ходом покинув берег, она ровно поплыла вниз. Мгновенно изменился масштаб видимого: ручей казался девочке огромной рекой, а яхта — далеким, большим судном, к которому, едва не падая в воду, испуганная и оторопевшая, протягивала она руки. "Капитан испугался", — подумала она и побежала за уплывающей игрушкой, надеясь, что ее где-нибудь прибьет к берегу. Поспешно таща не тяжелую, но мешающую корзинку, Ассоль твердила: — "Ах, господи! Ведь случись же..." — Она старалась не терять из вида красивый, плавно убегающий треугольник парусов, спотыкалась, падала и снова бежала.

Ассоль никогда не бывала так глубоко в лесу, как теперь. Ей, поглощенной нетерпеливым желанием поймать игрушку, не смотрелось по сторонам; возле берега, где она суетилась, было довольно препятствий, занимавших внимание. Мшистые стволы упавших деревьев, ямы, высокий папоротник, шиповник, жасмин и орешник мешали ей на каждом шагу; одолевая их, она постепенно теряла силы, останавливаясь все чаще и чаще, чтобы передохнуть или смахнуть с лица липкую паутину. Когда потянулись, в более широких местах, осоковые и тростниковые заросли, Ассоль совсем было потеряла из вида алое сверкание парусов, но, обежав излучину течения, снова увидела их, степенно и неуклонно бегущих прочь. Раз она оглянулась, и лесная громада с ее пестротой, переходящей от дымных столбов света в листве к темным расселинам дремучего сумрака, глубоко

ludilo kaj, kelkfoje eliginte profundan «f-fu-u-u», ekkuris per tuta forto.

En tia sensukcesa kaj maltrankvila persekuto pasis ĉirkaŭ horo, kiam kun miro, sed ankaŭ kun faciliĝo Assol ekvidis, ke arboj antaŭe libere disiĝis, tralasinte bluan vaston de la maro, nubojn kaj randon de flava sabla deklivo, sur kiun ŝi elkuris, preskaŭ falante pro laco. Ĉi tie estis la enfluejo de la rojo; disfluante larĝe kaj malprofunde, tiel ke videblis striiĝanta bluo de ŝtonoj, ĝi estis malaperanta en renkonta mara ondo. De sur la nealta deklivo, kavigita de radikoj, Assol ekvidis, ke ĉe la rojo, sur plata granda ŝtono, per la dorso al ŝi, sidas homo, tenante en la manoj la fuĝintan jaĥton, kaj ĉiuflanke pririgardas ĝin kun scivolemo de elefanto, kaptinta papilion. Parte trankviligita de tio, ke la ludilo estas sendifekta, Assol derampis laŭ la deklivo kaj, proksime alirinte al la nekonato, ekcelis al li esploran rigardon, atendente, kiam li levos la kapon. Sed la nekonato tiel enprofundiĝis en la kontempladon de la arbara surprizo, ke la knabino sukcesis pririgardi lin de la kapo ĝis la piedoj, konstatinte, ke homojn, similajn al tiu nekonato, ŝi ankoraŭ neniam vidis.

Sed antaŭ ŝi estas neniu alia, ol vojaĝanta perpiede Egle, fama kolektisto de kantoj, legendoj, mitoj kaj fabeloj. Grizharaj bukloj estis falde elfalantaj el sub lia pajla ĉapelo; griza bluzo, enŝovita en bluan pantalonon, kaj altaj botoj donis al li aspekton de ĉasisto; blanka kolumo, kravato, zono, kovrita per arĝento de ŝildetoj, apogbastono kaj saketo kun novega nikela buko — elmontris urbanon. Lia vizaĝo, se eblas tiel nomi nazon, lipojn kaj okulojn, elrigardantajn el sovaĝe diskreskinta radia barbo kaj pufaj, feroce kornigitaj supren lipharoj, ŝajnus malvigle diafana, se ne estus la okuloj, grizaj, kiel sablo, kaj brilantaj, kiel pura ŝtalo, kun rigardo kuraĝa kaj forta.

— Nun redonu al mi, — timeme diris la knabino. — Vi jam ludis. Vi kiel kaptis ĝin?

Egle levis la kapon, faliginte la jaĥton, — tiel neatendite eksonis la emocia voĉeto de Assol. La maljunulo dum minuto pririgardis ŝin, ridetante kaj malrapide tralasante la barbon en la granda, vejneca mankavo. Multfoje lavita katuna robo estis apenaŭ kovranta ĝis la genuoj la maldikajn, sunbrunajn krurojn de la knabino. Ŝiaj malhelaj densaj haroj, metitaj sub puntan kaptuketon, malordiĝis, tuŝante la ŝultrojn. Ĉiu trajto de Assol

porazila devojku. Na momento orobev, ŝa vspomnula vnovj ob igruŝke i, neskolko raz vypustiv gluboko "f-f-u-u", pobezala izo vsx sil.

В такой безуспешной и тревожной погоне прошло около часу, когда с удивлением, но и с облегчением Ассоль увидела, что деревья впереди свободно раздвинулись, пропустив синий разлив моря, облака и край желтого песчаного обрыва, на который она выбежала, почти падая от усталости. Здесь было устье ручья; разлившись нешироко и мелко, так что виднелась струящаяся голубизна камней, он пропадал в встречной морской волне. С невысокого, изрытого корнями обрыва Ассоль увидела, что у ручья, на плоском большом камне, спиной к ней, сидит человек, держа в руках сбежавшую яхту, и всесторонне рассматривает ее с любопытством слона, поймавшего бабочку. Отчасти успокоенная тем, что игрушка цела, Ассоль сползла по обрыву и, близко подойдя к незнакомцу, воззрилась на него изучающим взглядом, ожидая, когда он подымет голову. Но неизвестный так погрузился в созерцание лесного сюрприза, что девочка успела рассмотреть его с головы до ног, установив, что людей, подобных этому незнакомцу, ей видеть еще ни разу не приходилось.

Но перед ней был не кто иной, как путешествующий пешком Эгль, известный собиратель песен, легенд, преданий и сказок. Седые кудри складками выпадали из-под его соломенной шляпы; серая блуза, заправленная в синие брюки, и высокие сапоги придавали ему вид охотника; белый воротничок, галстук, пояс, унизанный серебром блях, трость и сумка с новеньким никелевым замочком — выказывали горожанина. Его лицо, если можно назвать лицом нос, губы и глаза, выглядывавшие из бурно разросшейся лучистой бороды и пышных, свирепо взрогаченных вверх усов, казалось бы вялопрозрачным, если бы не глаза, серые, как песок, и блестящие, как чистая сталь, с взглядом смелым и сильным.

— Теперь отдай мне, — несмело сказала девочка. — Ты уже поиграл. Ты как поймал ее?

Эгль поднял голову, уронив яхту, — так неожиданно прозвучал взволнованный голосок Ассоль. Старик с минуту разглядывал ее, улыбаясь и медленно пропуская бороду в большой, жилистой горсти. Стиранное много раз ситцевое платье едва прикрывало до колен худенькие, загорелые ноги девочки. Ее темные густые волосы, забранные в кружевную косынку, сбились, касаясь плеч. Каждая черта Ассоль была выразительно легка и чиста, как

estis esprime malpeza kaj pura, kiel flugo de hirundo. La malhelaj, kun nuanco de malgaja demando, okuloj ŝajnis iom pli aĝaj ol la vizaĝo; ties malregula glata ovalo estis kovrita de tiaspeca ĉarma sunbruno, kia karakterizas sanan blancon de haŭto. La duonmalfermita buŝo brilis per milda rideto.

— Mi ĵuras per Grimm-oj, Ezopo kaj Andersen, — diris Egle, rigardante jen al la knabino, jen al la jaĥto. — Tio estas io speciala. Aŭskultu, vi, planto! Ĉio tio estas via aĵo?

— Jes, mi kuris post ĝin laŭ la tuta roĵo; mi pensis, ke mi mortos. Ĉu ĝi estis ĉi tie?

— Ĉe miaj piedoj mem. Ŝippereo estas la kaŭzo de tio, ke mi, kiel borda pirato, povas enmanigi al vi tiun ĉi trofeon. La jaĥton, forlasitan de la ŝipanaro, elĵetis sur la sablon kvin-cola ondego — inter mia maldekstra kalkano kaj la fino de la bastono. — Li frapis per la apogbastono. — Kiu estas via nomo, etulino?

— Assol, — diris la knabino, kaŝante en la korbon la ludilon, donitan de Egle.

— Bone, — daŭrigis la nekompreneblan parolon la maljunulo, ne deŝirante la okulojn, en kies profundo briletis subrido de amikema animagordo. — Mi, propre, ne devus demandi vian nomon. Estas bone, ke ĝi estas tiel stranga, tiel unutona, muzika, kiel fajfo de sago aŭ bruo de mara konkono: kion mi farus, se vi nomiĝus per unu el tiuj belsonaj, sed netolereble kutimaj nomoj, kiuj fremdas al la Bela Nekono? Des pli mi ne deziras scii, kiu vi estas, kiuj estas viaj gepatroj kaj kiel vi vivas. Por kio rompi la ĉarmon? Mi estis okupiĝanta, kiam mi sidis sur tiu ĉi ŝtono, pri kompara esploro de finnaj kaj japanaj rakontotemoj... kiam subite la roĵo elĵetis tiun ĉi jaĥton, kaj poste aperis vi... Tia, kia vi estas. Mi, kara, estas poeto en la animo — kvankam neniam verkis mem. Kio estas en via korbo?

— Boatetoj, — diris Assol, skuante la korbon, — krome vaporŝipo kaj ankoraŭ tri tiaj dometoj kun flagoj. Tie soldatoj loĝas.

— Bonege. Oni sendis vin por vendi. Dum la vojo vi okupiĝis pri ludo. Vi sendis la jaĥton iom navigi, kaj ĝi fuĝis — ja estis tiel, ĉu?

— Ĉu vi vidis tion? — kun dubo demandis Assol, penante rememori, ĉu ŝi mem rakontis tion. — Ĉu al vi iu diris? Aŭ vi divenis?

— Mi tion sciis. — Sed kiel?

полет ласточки. Темные, с оттенком грустного вопроса глаза казались несколько старше лица; его неправильный мягкий овал был овеян того рода прелестным загаром, какой присущ здоровой белизне кожи. Полуоткрытый маленький рот блестел кроткой улыбкой.

— Клянусь Гриммами, Эзопом и Андерсеном, — сказал Эгль, посматривая то на девочку, то на яхту. — Это что-то особенное. Слушай-ка ты, растение! Это твоя штука?

— Да, я за ней бежала по всему ручью; я думала, что умру. Она была тут?

esploro igis Gray-on penetri en la bibliotekon, lin afekciis polva lumo, kies tutan forton kaj specifecon kaŭzis kolora arabesko de la supra parto de la fenestraj vitroj. Silento de forlasiteco staris ĉi tie, kiel akvo en lageto. Malhelaj vicoj de libroŝrankoj iuloke estis tuŝantaj la fenestrojn, ŝirminte ilin duone, inter la ŝrankoj estis pasejoj, ŝtopitaj per amasoj de libroj. Tie — malfermita albumo kun elglitintaj internaj folioj, tie — rulaĵoj, ligitaj per ora ŝnuro; stakoj da mornaspektaj libroj; dikaj tavoloj da manuskriptoj, monto da miniaturaj volumetoj, krakantaj, kiel arboŝelo, kiam oni ilin malfermas; ĉi tie — desegnaĵoj kaj tabeloj, vicoj da novaj eldonoj, mapoj; diverseco de bindaĵoj, krudaj, delikataj, nigraj, buntaj, bluaj, grizaj, dikaj, maldikaj, raspaj kaj glataj. La ŝrankoj estis plenŝtopitaj per libroj. Ili ŝajnis muroj, fermintaj la vivon en sia interno mem. En spegulaĵoj de ŝrankaj vitroj videblis aliaj ŝrankoj, kovritaj de senkoloraj brilantaj makuloj. Grandega globuso, katenita en kupran sferan krucon de ekvatoro kaj meridiano, staris sur ronda tablo.

Turniĝinte al la elirejo, Gray ekvidis super la pordo grandegan pentraĵon, kiu tuj per sia enhavo plenigis sufokan senmovecon de la biblioteko. La pentraĵo montris ŝipon, leviĝantan sur kreston de mara ondego. Ŝaŭmaj strioj estis defluantaj laŭ ĝia flanko. Ĝi estis montrita en la lasta momento de ekflugo. La ŝipo estis iranta rekte al la spektanto. La alte leviĝinta busprito estis ŝirmanta la radikojn de la mastoj. La kresto de la ondego, displugita de la ŝipa kilo, rememorigis pri flugiloj de giganta birdo. Ŝaŭmo flugis en la aeron. La veloj, nebule videblaj el trans la babordo kaj super la busprito, plenaj je furioza ŝtorma forto, estis falantaj malantaŭen per tuta sia masego, por, post transiro de la ondego, rektiĝi, kaj poste, kliniĝante super la abismo, peli la ŝipon al novaj lavangoj. Disŝiritaj nuboj estis malalte tremantaj super la oceano. Malhela lumo estis senespere luktanta kontraŭ alruliĝanta nokta obskuro. Sed plej rimarkinda estis en tiu pentraĵo la homa figuro, staranta sur la teŭgo per la dorso al la spektanto. Ĝi estis esprimanta la tutan staton, eĉ la karakteron de la momento. La pozo de la homo (li disstarigis la piedojn, svinginte la manojn) nenion propre diris pri tio, per kio li estas okupita, sed ĝi estis supoziganta ekstremajn streĉojn de atento, direktita al io sur la ferdeko, nevidebla al la spektanto. Falditajn baskojn de lia kaftano taŭzis la vento; la blanka harligo kaj la nigra spado etendite impetis en la aeron; riĉeco de la kostumo montris en li ŝipestron, la dancanta pozo de la korpo — la eksvingon de la ondego; sen ĉapelo, li estis,

Грэй проникнуть в библиотеку, его поразил пыльный свет, вся сила и особенность которого заключалась в цветном узоре верхней части оконных стекол. Тишина покинутости стояла здесь, как прудовая вода. Темные ряды книжных шкапов местами примыкали к окнам, заслонив их наполовину, между шкапов были проходы, заваленные горами книг. Там — раскрытый альбом с выскользнувшими внутренними листами, там — свитки, перевязанные золотым шнуром; стопы книг угрюмого вида; толстые пласты рукописей, насыпь миниатюрных томиков, трещавших, как кора, если их раскрывали; здесь — чертежи и таблицы, ряды новых изданий, карты; разнообразие переплетов, грубых, нежных, черных, пестрых, синих, серых, толстых, тонких, шершавых и гладких. Шкапы были плотно набиты книгами. Они казались стенами, заключившими жизнь в самой толще своей. В отражениях шкапных стекол виднелись другие шкапы, покрытые бесцветно блестящими пятнами. Огромный глобус, заключенный в медный сферический крест экватора и меридиана, стоял на круглом столе.

Обернувшись к выходу, Грэй увидел над дверью огромную картину, сразу содержанием своим наполнившую душное оцепенение библиотеки. Картина изображала корабль, вздымающийся на гребень морского вала. Струи пены стекали по его склону. Он был изображен в последнем моменте взлета. Корабль шел прямо на зрителя. Высоко поднявшийся бугшприт заслонял основание мачт. Гребень вала, распластаный корабельным килем, напоминал крылья гигантской птицы. Пена неслась в воздух. Паруса, туманно видимые из-за бакборта и выше бугшприта, полные неистовой силы шторма, валились всей громадой назад, чтобы, перейдя вал, выпрямиться, а затем, склоняясь над бездной, мчать судно к новым лавинам. Разорванные облака низко трепетали над океаном. Тусклый свет обреченно боролся с надвигающейся тьмой ночи. Но всего замечательнее была в этой картине фигура человека, стоящего на баке спиной к зрителю. Она выражала все положение, даже характер момента. Поза человека (он расставил ноги, взмахнув руками) ничего собственно не говорила о том, чем он занят, но заставляла предполагать крайнюю напряженность внимания, обращенного к чему-то на палубе, невидимой зрителю. Завернутые полы его кафтана трепались ветром; белая коса и черная шага вытянуто рвались в воздух; богатство костюма выказывало в нем капитана, танцующее положение тела — взмах вала; без шляпы, он был, видимо, поглощен опасным моментом и кричал — но что? Видел ли он, как валится за борт человек,

evidente, absorbita de la danĝera momento kaj krianta — sed kion? Ĉu li vidis, kiel falas ekster la ŝiprandon homo, ĉu li estis ordonanta ŝanĝi halson aŭ, superante la venton, vokis la ferdekestron? Ne pensoj, sed ombroj de tiuj pensoj elkreskis en la animo de Gray, dum li estis spektanta la pentraĵon. Subite ŝajnis al li, ke maldekstre aliris, ekstarinte apude, nevidebla nekonato; sufiĉis turni la kapon, kaj la bizara sento malaperus senspure. Gray sciis tion. Sed li ne estingis la imagon, sed fiksaŭskultis. Sensona voĉo elkriis kelkajn abruptajn frazojn, nekomprenoblajn, kiel la malaja lingvo; aŭdiĝis bruo kvazaŭ de longaj lavangoj; eĥo kaj morna vento plenigis la bibliotekon. Ĉion ĉi Gray aŭdis interne de si. Li ĉirkaŭrigardis: momente estiĝinta silento dispelis la sonorajn araneaĵojn de la fantazio; la ligo kun la tempesto malaperis.

Gray kelkfoje venadis por spekti tiun ĉi pentraĵon. Ĝi iĝis por li tiu necesa vorto en la konversacio de la animo kun la vivo, sen kiu estas malfacile kompreni sin. En la malgranda knabo iom post iom estis metiĝanta la grandega maro. Li parenციĝis kun ĝi, fosante en la biblioteko, eltrovante kaj avide legante tiujn librojn, trans kies ora pordo malfermiĝadis blua brilo de oceano. Tie, semante post la poŭpoj ŝaŭmon, iradis ŝipoj. Parto de ili perdadis velojn, mastojn kaj, kovrata de ondo, malleviĝadis en obskuron de la abismo, kie briletas fosforeskaj fiŝaj okuloj. Aliaj, kaptitaj de surfo, batiĝadis kontraŭ rifojn; kvietiĝanta ondiĝo minace ŝanceladis la ŝipkorpon; la senhomiĝinta ŝipo kun ŝirita rigilaro longe agoniadis, ĝis nova ŝtormo plene frakasadis ĝin. Triaj estis bonorde ŝarĝataj en unu haveno kaj malŝarĝataj en la alia; la ŝipanaro, sidante ĉe taverna tablo, prikantadis la vojaĝon kaj ame drinkis vodkon. Estis tie ankoraŭ ŝipoj-piratoj, kun nigra flago kaj terura, svinganta per tranĉiloj anaro; ŝipoj-fantomoj, brilantaj per morta lumo de blua aŭreolo; militaj ŝipoj kun soldatoj, kanonoj kaj muziko; ŝipoj de sciencaj ekspedicioj, esplorantaj vulkanojn, vegetaĵojn kaj animalojn; ŝipoj kun malbona mistero kaj ribeloj; ŝipoj de malkovroj kaj ŝipoj de aventuroj.

En tiu ĉi mondo, nature, altis super ĉio la figuro de ŝipestro. Li estis la sorto, la animo kaj la racio de la ŝipo. Lia karaktero determinis la laboron kaj la amuzojn de la ŝipanaro. La ŝipanaro mem estis elektata de li persone kaj en multaj aspektoj konformis al liaj inklinoj. Li sciis kutimojn kaj familiajn aferojn de ĉiu homo. Li havis en la okuloj de la subuloj magian scion, danke al kiu li certe iris, ekzemple, el Lisbono en Ŝanhajon, laŭ

приказывал ли повернуть на другой галс или, заглушая ветер, звал боцмана? Не мысли, но тени этих мыслей выросли в душе Грэя, пока он смотрел картину. Вдруг показалось ему, что слева подошел, став рядом, неизвестный невидимый; стоило повернуть голову, как причудливое ощущение исчезло бы без следа. Грэй знал это. Но он не погасил воображения, а прислушался. Беззвучный голос выкрикнул несколько отрывистых фраз, непонятных, как малайский язык; раздался шум как бы долгих обвалов; эхо и мрачный ветер наполнили библиотеку. Все это Грэй слышал внутри себя. Он осмотрелся: мгновенно вставшая тишина рассеяла звучную паутину фантазии; связь с бурей исчезла.

Грэй несколько раз приходил смотреть эту картину. Она стала для него тем нужным словом в беседе души с жизнью, без которого трудно понять себя. В маленьком мальчике постепенно укладывалось огромное море. Он сжился с ним, роясь в библиотеке, выискивая и жадно читая те книги, за золотой дверью которых открывалось синее сияние океана. Там, сея за кормой пену, двигались корабли. Часть их теряла паруса, мачты и, захлебываясь волной, опускалась в тьму пучин, где мелькают фосфорические глаза рыб. Другие, схваченные бурунами, бились о рифы; утихающее волнение грозно шатало корпус; обезлюдевший корабль с порванными снастями переживал долгую агонию, пока новый шторм не разносил его в щепки. Третьи благополучно грузились в одном порту и выгружались в другом; экипаж, сидя за трактирным столом, воспевал плавание и любовно пил водку. Были там еще корабли-пираты, с черным флагом и страшной, размахивающей ножами командой; корабли-призраки, сияющие мертвенным светом синего озарения; военные корабли с солдатами, пушками и музыкой; корабли научных экспедиций, высматривающие вулканы, растения и животных; корабли с мрачной тайной и бунтами; корабли открытий и корабли приключений.

В этом мире, естественно, возвышалась над всем фигура капитана. Он был судьбой, душой и разумом корабля. Его характер определял досуга и работу команды. Сама команда подбиралась им лично и во многом отвечала его наклонностям. Он знал привычки и семейные дела каждого человека. Он обладал в глазах подчиненных магическим знанием, благодаря которому уверенно шел, скажем, из Лиссабона в Шанхай, по необозримым

neĉirkaŭrigardebla spaco. Li rebatadis tempeston per kontraŭago de sistemo de komplikaj penoj, mortigante panikon per mallongaj ordonoj; li navigadis kaj haltadis, kie li deziris; estris eknavigon kaj ŝarĝadon, riparon kaj ripozon; pli granda kaj pli racia potenco en viva afero, plena de seninterrompa movado, estis malfacile imagebla. Tiu potenco per fomiteco kaj pleneco egalas al la potenco de Orfeo.

Tia imago pri ŝipestro, tia aspekto kaj tia vera realeco de lia stato okupis, laŭ rajto de animaj eventoj, la ĉefan lokon en la brilanta konscio de Gray. Neniu profesio, krom tiu, povus tiel sukcese kunfandi en unu tutaĵon ĉiujn trezorojn de la vivo, konservinte netuŝebla delikatan plektaĵon de ĉiu aparta feliĉo. Danĝero, risko, potenco de la naturo, lumo de fora lando, mirakla nekono, ŝaŭma amo, floranta per rendezuo kaj disiĝo; absorbanta bolo de renkontoj, vizaĝoj, okazaĵoj; senlima diverseco de la vivo, dum alte en la ĉielo staras jen la Suda Kruco, jen la Ursino, kaj ĉiuj kontinentoj estas en la atentaj okuloj, kvankam via kajuto plenas je neforlasanta patrujo kun ties libroj, bildoj, leteroj kaj sekaj floroj, ĉirkaŭvolvitaj per silka harbuklo en ŝama amuleto sur la malmola brusto. Aŭtune, en la dekkvina jaro de la vivo, Arturo Gray kaŝe forlasis la hejmon kaj penetris trans la oran pordegon de la maro. Baldaŭ el haveno Dubelto eliris en Marselon skuno «Anselmo», forveturigante ŝipknabon kun malgrandaj manoj kaj aspekto de alivestita knabino. Tiu ŝipknabo estis Gray, la posedanto de eleganta vojaĝsako, de maldikaj, kiel ganto, lakitaj botetoj kaj de batista subvesto kun teksitaj kronoj.

Dum jaro, kiam «Anselmo» vizitadis Francion, Amerikon kaj Hispanion, Gray fordisipis parton de sia havaĵo al kukoj, pagante per tio tributon al la pasinteco, kaj la ceteran parton — por la nuno kaj la estonteco — forkartludis. Li deziris esti «diabla» maristo. Li, sufokiĝante, drinkadis vodkon, kaj dum baniĝo, kun haltanta koro, saltadis en la akvon per la kapo malsupren de sur duklafta alto. Iom post iom li perdis ĉion, krom la ĉefa — sia stranga fluganta animo; li perdis la malfortecon, iĝinte larĝŝultra kaj fortika muskole, la palecon li anstataŭigis per malhela sunbruno, la rafinitan senzorgecon de moviĝoj fordonis kontraŭ certa precizeco de laboranta mano, kaj en liaj pensantaj okuloj reflektiĝis brilo, kiel ĉe homo, rigardanta al fajro. Kaj lia parolo, perdinte malglatan, orgojle sinĝeneman fluan, iĝis konciza kaj preciza, kiel bato de mevo en strion de tremanta fiŝa arĝento.

пространствам. Он отражал бурю противодействием системы сложных усилий, убивая панику короткими приказаниями; плывал и останавливался, где хотел; распоряжался отплытием и нагрузкой, ремонтом и отдыхом; большую и разумнейшую власть в живом деле, полном непрерывного движения, трудно было представить. Эта власть замкнутостью и полнотой равнялась власти Орфея.

Такое представление о капитане, такой образ и такая истинная действительность его положения заняли, по праву душевных событий, главное место в блистающем сознании Грэя. Никакая профессия, кроме этой, не могла бы так удачно сплавить в одно целое все сокровища жизни, сохранив неприкосновенным тончайший узор каждого отдельного счастья. Опасность, риск, власть природы, свет далекой страны, чудесная неизвестность, мелькающая любовь, цветущая свиданием и разлукой; увлекательное кипение встреч, лиц, событий; безмерное разнообразие жизни, между тем как высоко в небе то Южный Крест, то Медведица, и все материки — в зорких глазах, хотя твоя каюта полна непокидающей родины с ее книгами, картинами, письмами и сухими цветами, обвитыми шелковистым локоном в замшевой ладанке на твердой груди. Осенью, на пятнадцатом году жизни, Артур Грэй тайно покинул дом и проник за золотые ворота моря. Вскорости из порта Дубельт вышла в Марсель шхуна "Ансельм", увозя юнгу с маленькими руками и внешностью переодетой девочки. Этот юнга был Грэй, обладатель изящного саквояжа, тонких, как перчатка, лакированных сапожков и батистового белья с вытканными коронами.

В течение года, пока "Ансельм" посещал Францию, Америку и Испанию, Грэй промотал часть своего имущества на пирожном, отдавая этим дань прошлому, а остальную часть — для настоящего и будущего — проиграл в карты. Он хотел быть "дьявольским" моряком. Он, задыхаясь, пил водку, а на купаньи, с замирающим сердцем, прыгал в воду головой вниз с двухсаженной высоты. По-немногу он потерял все, кроме главного — своей странной летящей души; он потерял слабость, став широк костью и крепок мускулами, бледность заменил темным загаром, изысканную беспечность движений отдал за уверенную меткость работающей руки, а в его думающих глазах отразился блеск, как у человека, смотрящего на огонь. И его речь, утратив неравномерную, надменно застенчивую текучесть, стала краткой и точной, как удар чайки в струю за трепетным серебром рыб.

La ŝipestro de «Anselmo» estis bona homo, sed severa maristo, preninta la knabon pro ioma malicemo. En la despera deziro de Gray li vidis nur ekscentran kapricon kaj anticipi jubilis, imagante, kiel post du monatoj Gray diros al li, evitante rigardi en la okulojn: «Ŝipestro Hop, mi gratvundis la kubutojn, grimpante laŭ ŝnuroj; al mi doloras la flankoj kaj la dorso, la fingroj ne malfleksiĝas, la kapo krevas, kaj la kruroj tremas. Ĉiuj ĉi malsekaj ŝnuroj, okdek funtojn pezaj, sur la manoj; ĉiuj ĉi ralikoj, vantoj, vindasoj, haŭseroj, topmastoj kaj topoj estas kreitaj por turmenti mian delikatan korpon. Mi deziras al panjo». Aŭskultinte pense tian deklaron, ŝipestro Hop faradis, same pense, jenan parolon: «Iru do kien vi deziras, mia birdido. Se al viaj sentemaj flugiletoj algluiĝis peĉo, vi povas forlavi ĝin hejme — per odekolono "Rozo-Mimozo"». Tiu elpensita de Hop odekolono pleje ĝojigis la ŝipestron, kaj, fininte la imagatan rebaton, li laŭte ripetadis: «Jes. Iru al "Rozo-Mimozo"».

Tamen la impona dialogo venadis en la kapon de la ŝipestro ĉiam pli kaj pli malofte, ĉar Gray iris al la celo kun kunpremitaj dentoj kaj paliĝinta vizaĝo. Li eltenadis ĝenan laboron kun decida volstreĉo, sentante, ke al li iĝas ĉiam pli kaj pli facile, dum la severa ŝipo enrompiĝadis en lian organismon, kaj nescipovon anstataŭigadis kutimo. Okazadis, ke maŝo de ankra ĉeno faligadis lin, batante kontraŭ la ferdekon, ke kablo, nefiksita sur bito, elŝiriĝadis el liaj manoj, forgratante la haŭton de sur la polmoj, ke vento batadis lin laŭ la vizaĝo per malseka angulo de velo kun enkudrita en ĝin fera ringo, kaj, mallonge dirante, tuta laboro estis torturo, postulanta streĉitan atenton, sed, malgraŭ tio, ke li peze spiris kaj malfacile povis malfleksi la dorson, malestima rideto ne forlasadis lian vizaĝon. Li silente toleris priridojn, mokojn kaj neeviteblan sakradon, ĝis iĝis en la nova sfero «sia», sed post tiam nepre respondadis per bokso al ajna ofendo.

Foje ŝipestro Hop, vidinte, kiel li majstre ligas velon sur jardon, diris al si: «Venko estas sur via flanko, fripono». Kiam Gray malleviĝis sur la ferdekon, Hop vokis lin en sian kajuton kaj, malferminte eluzitan libron, diris: — Aŭskultu atente! Ĉesu fumi! Ni komencas fari el hundido ŝipestron.

Kaj li komencis legi, pli ĝuste, paroli kaj krii, laŭ la libro antikvajn vortojn de la maro. Tio estis la unua leciono de Gray. Dum jaro li ekkonis navigacion, ŝipkonstruadon, maran juron, ŝipgvidadon kaj kontadon. Ŝipestro Hop manpremadis lin kaj diradis:

Капитан "Ансельма" был добрый человек, но суровый моряк, взявший мальчика из некоего злорадства. В отчаянном желании Грэя он видел лишь эксцентрическую прихоть и заранее торжествовал, представляя, как месяца через два Грэй скажет ему, избегая смотреть в глаза: — "Капитан Гоп, я ободрал локти, ползая по снастям; у меня болят бока и спина, пальцы не разгибаются, голова трещит, а ноги трясутся. Все эти мокрые канаты в два пуда на весу рук; все эти леера, ванты, брашпили, тросы, стеньги и саллинги созданы на мучение моему нежному телу. Я хочу к маме". Выслушав мысленно такое заявление, капитан Гоп держал, мысленно же, следующую речь: — "Отправляйтесь куда хотите, мой птенчик. Если к вашим чувствительным крылышкам пристала смола, вы можете отмыть ее дома одеколоном "Роза-Мимоза". Этот выдуманный Гопом одеколон более всего радовал капитана и, закончив воображенную отповедь, он вслух повторял: — Да. Ступайте к "Розе-Мимозе".

Между тем внушительный диалог приходил на ум капитану все реже и реже, так как Грэй шел к цели с стиснутыми зубами и побледневшим лицом. Он выносил беспокойный труд с решительным напряжением воли, чувствуя, что ему становится все легче и легче по мере того, как суровый корабль втамывался в его организм, а неумение заменялось привычкой. Случалось, что петлей якорной цепи его сшибало с ног, ударяя о палубу, что непридержанный у кнека канат вырывался из рук, сдирая с ладоней кожу, что ветер бил его по лицу мокрым углом паруса с вшитым в него железным кольцом, и, короче сказать, вся работа являлась пыткой, требующей пристального внимания, но, как ни тяжело он дышал, с трудом разгибая спину, улыбка презрения не оставляла его лица. Он молча сносил насмешки, издевательства и неизбежную брань, до тех пор пока не стал в новой сфере "своим", но с этого времени неизменно отвечал боксом на всякое оскорбление.

Однажды капитан Гоп, увидев, как он мастерски вяжет на рею парус, сказал себе: "Победа на твоей стороне, плут". Когда Грэй спустился на палубу, Гоп вызвал его в каюту и, раскрыв истрепанную книгу, сказал: — Слушай внимательно! Брось курить! Начинается отделка щенка под капитана.

И он стал читать — вернее, говорить и кричать — по книге древние слова моря. Это был первый урок Грэя. В течение года он познакомился с навигацией, практикой, кораблестроением, морским правом, лоцией и бухгалтерией. Капитан Гоп подавал ему

«Ni».

En Vankuvero Gray-on kaptis letero de la patrino, plena de larmoj kaj timo. Li respondis: «Mi scias. Sed se vi vidus, kiel mi: rigardu per miaj okuloj. Se vi aŭdus, kiel mi: almetu al la orelo konkon: en ĝi estas bruo de eterna ondo; se vi amus, kiel mi — ĉion, en via letero mi trovus, krom amo kaj la ĉeko, — rideton...» Kaj li plu navigadis, ĝis «Anselmo» venis kun kargo en Dubelton, de kie, uzante la halton, la dudek-jara Gray direktis sin por viziti la kastelon. Ĉio estis la sama ĉirkaŭe; same nedetruable en detaloj kaj en ĝenerala impresoj, kiel antaŭ kvin jaroj, nur pli densa iĝis foliaro de junaj ulmoj; ĝia arabesko sur la fasado de la domo deŝoviĝis kaj diskreskis.

La servistoj, alkurintaj al li, ekĝojis, vigliĝis kaj rigidiĝis en la sama respekto, kun kiu, kvazaŭ antaŭ ne pli longe ol hieraŭ, ili renkontadis tiun ĉi Gray-on. Oni diris al li, kie estas la patrino; li trairis en la altan ejon kaj, mallaŭte ferminte la pordon, sensone haltis, rigardante al la grizhariĝinta virino en nigra robo. Ŝi staris antaŭ krucifikso: ŝia pasia flustro estis sonora, kiel plena batado de koro. «Kaj benu marirantojn, vojaĝantojn, malsanantojn, suferantojn kaj kaptitojn», — aŭdis, mallonge spirante, Gray. Poste estis dirite: «kaj mian knabon...» Tiam li diris: «Mi...» Sed ne plu povis ion eldiri. La patrino turniĝis. Ŝi maldikiĝis: en la orgojleco de ŝia maldika vizaĝo lumis nova esprimo, simila al reveninta juneco. Ŝi impete aliris al la filo; mallonga elbrusta rido, retenita ekkrio kaj larmoj en la okuloj — jen ĉio. Sed en tiu ĉi minuto ŝi vivis pli forte kaj pli bone, ol dum la tuta vivo. «Mi tuj rekonis vin, ho, mia kara, mia eta!» Kaj Gray vere ĉesis esti plenaĝa. Li aŭskultis pri la morto de la patro, poste rakontis pri si. Ŝi atentis sen riproĉoj kaj kontraŭdiroj, sed interne de si — en ĉio, kion li asertadis, kiel la veron de sia vivo, — ŝi vidis nur ludilojn, per kiuj amuzas sin ŝia knabo. Tiuj ludiloj estis kontinentoj, oceanoj kaj ŝipoj.

Gray estis en la kastelo sep tagojn; en la oka tago, preninte grandan monsumon, li revenis en Dubelton kaj diris al ŝipestro Hop: «Dankon. Vi estis bona kamarado. Adiaŭ do, mia mentoro, — ĉi tie li firmigis la veran sencon de tiu ĉi vorto per terura, kiel vajco, manpremo, — nun mi navigados aparte, sur propra ŝipo». Hop ruĝiĝis, kraĉis, elŝiris la manon kaj ekiris for, sed Gray, atinginte, brakumis lin. Kaj ili eksidis en gastejo, ĉiuj kune, dudek kvar homoj, inklude la ŝipanaron, kaj drinkis, kaj kriis, kaj kantis, kaj

руку и говорил: "Мы".

В Ванкувере Грэй поймало письмо матери, полное слез и страха. Он ответил: "Я знаю. Но если бы ты видела, как я; посмотри моими глазами. Если бы ты слышала, как я: приложи к уху раковину: в ней шум вечной волны; если бы ты любила, как я — все, в твоём письме я нашел бы, кроме любви и чека, — улыбку..." И он продолжал плавать, пока "Ансельм" не прибыл с грузом в Дубельт, откуда, пользуясь остановкой, двадцатилетний Грэй отправился навестить замок. Все было то же кругом; так же нерушимо в подробностях и в общем впечатлении, как пять лет назад, лишь гуще стала листва молодых вязов; её узор на фасаде здания сдвинулся и разросся.

Слуги, сбегавшиеся к нему, обрадовались, встрепенулись и замерли в той же почтительности, с какой, как бы не далее как вчера, встречали этого Грэй. Ему сказали, где мать; он прошел в высокое помещение и, тихо прикрыв дверь, неслышно остановился, смотря на поседевшую женщину в черном платье. Она стояла перед распятием: её страстный шепот был звучен, как полное биение сердца. — "О плавающих, путешествующих, болеющих, страдающих и плененных", — слышал, коротко дыша, Грэй. Затем было сказано: — "и мальчику моему..." Тогда он сказал: — "Я ..." Но больше не мог ничего выговорить. Мать обернулась. Она похудела: в надменности её тонкого лица светилось новое выражение, подобное возвращенной юности. Она стремительно подошла к сыну; короткий грудной смех, сдержанное восклицание и слезы в глазах — вот все. Но в эту минуту она жила сильнее и лучше, чем за всю жизнь. — "Я сразу узнала тебя, о, мой милый, мой маленький!" И Грэй действительно перестал быть большим. Он выслушал о смерти отца, затем рассказал о себе. Она внимала без упреков и возражений, но про себя — во всем, что он утверждал, как истину своей жизни, — видела лишь игрушки, которыми забавляется её мальчик. Такими игрушками были материки, океаны и корабли.

Грэй пробыл в замке семь дней; на восьмой день, взяв крупную сумму денег, он вернулся в Дубельт и сказал капитану Гопу: "Благодарю. Вы были добрым товарищем. Прощай же, старший товарищ, — здесь он закрепил истинное значение этого слова жутким, как тиски, рукопожатием, — теперь я буду плавать отдельно, на собственном корабле". Гоп вспыхнул, плюнул, вырвал руку и пошел прочь, но Грэй, догнав, обнял его. И они уселись в гостинице, все вместе, двадцать четыре человека с командой, и пили, и

etrinkis kaj formanĝis ĉion, kio estis en la bufedo kaj en la kuirejo.

Pasis ankoraŭ malmulta tempo, kaj en la haveno Dubelto vespera stelo brileris super nigra linio de nova masto. Tio estis «Sekreto», aĉetita de Gray; trimasta galioto (Grin eraris: ekzistas nur dumastaj galiotoj (rim. de la tradukinto)) je ducent sesdek tunoj. Tiel, estante ŝipestro kaj proprulo de la ŝipo, Arturo Gray navigadis ankoraŭ kvar jarojn, ĝis la sorto venigis lin en Liss-on. Sed li jam por ĉiam enmemorigis tiun mallongan elbrustan ridon, plenan de kora muziko, per kiu li estis renkontita hejme, kaj dufoje dum jaro vizitadis la kastelon, lasante al la virino kun arĝentaj haroj nefirman certecon pri tio, ke tia granda knabo, verŝajne, sukcesos regi siajn ludilojn.

III. Mateniĝo

Ŝaŭma strio post la poŭpo de «Sekreto», la ŝipo de Gray, trairis la oceanon kiel blanka streko kaj estingiĝis en brilo de vesperaj lumoj de Liss. La ŝipo ekstaris en rodo proksime de la lumturo.

Dum dek tagoj «Sekreto» estis malŝarĝanta silkon, kafon kaj teon, la dek unuan tagon la ŝipanaro pasigis sur la bordo, en ripozo kaj vinaj vaporoj; en la dek dua tago Gray obtuze eksopiris, sen ajna kaŭzo, ne komprenante la sopiron.

Jam matene, ĵus vekigiĝinte, li tuj eksentis, ke tiu tago komenciĝis por li en nigraj radioj. Li morne vestis sin, malvolonte matenmanĝis, forgesis legi ĵurnalon kaj longe fumis, enprofundiĝinta en neesprimeblan mondon de sencela streĉo; inter malklare aperantaj vortoj vagis neagnoskitaj deziroj, reciproke neniigante sin per egala peno. Tiam li okupiĝis pri laboro.

Akompanata de la ferdekestro, Gray pririgardis la ŝipon, ordonis streĉi la vantojn, malstreĉi la droson, purigi la klusojn, ŝanĝi la ĵibon, gudri la ferdekon, senpolvigi la kompason, malfermi, aerumi kaj balai la holdon. Sed la laboro ne distris Gray-on. Plena de maltrankvila atento al la tristeco de la tago, li travivis ĝin inciteme kaj malgaje: lin kvazaŭ vokis iu, sed li forgesis, kiu kaj kien.

Vespere li eksidis en sia kajuto, prenis libron kaj longe kontraŭdiradis al la aŭtoro, farante sur la marĝenoj paradoksajn notojn. Dum ioma tempo lin amuzadis tiu ludo, tiu konversacio kun mortinto, potencanta el la ĉerko. Poste, preninte la pipon, li dronis en blua fumo, vivante inter fantomaj arabeskoj, aperantaj en ĝiaj ŝanceliĝemaj tavoloj. Tabako havas teruran povon; kiel oleo, elverŝita en

кричали, и пели, и выпили и съели все, что было на буфете и в кухне.

Прошло еще мало времени, и в порте Дубельт вечерняя звезда сверкнула над черной линией новой мачты. То был "Секрет", купленный Грэм; трехмачтовый галиот в двести шестьдесят тонн. Так, капитаном и собственником корабля Артур Грэй плывал еще четыре года, пока судьба не привела его в Лисе. Но он уже навсегда запомнил тот короткий грудной смех, полный сердечной музыки, каким встретили его дома, и раза два в год посещал замок, оставляя женщине с серебряными волосами нетвердую уверенность в том, что такой большой мальчик, пожалуй, справится с своими игрушками.

III РАССВЕТ

Струя пены, отбрасываемая кормой корабля Грэй "Секрет", прошла через океан белой чертой и погасла в блеске вечерних огней Лисса. Корабль встал на рейде недалеко от маяка.

Десять дней "Секрет" выгружал чесучу, кофе и чай, одиннадцатый день команда провела на берегу, в отдыхе и винных парах; на двенадцатый день Грэй глухо затосковал, без всякой причины, не понимая тоски.

Еще утром, едва проснувшись, он уже почувствовал, что этот день начался в черных лучах. Он мрачно оделся, неохотно позавтракал, забыл прочитать газету и долго курил, погруженный в невыразимый мир бесцельного напряжения; среди смутно возникающих слов бродили непризнанные желания, взаимно уничтожая себя равным усилием. Тогда он занялся делом.

В сопровождении боцмана Грэй осмотрел корабль, велел подтянуть ванты, ослабить штуртрос, почистить клюзы, переменить кливер, просмолить палубу, вычистить компас, открыть, проветрить и вымести трюм. Но дело не развлекало Грэя. Полный тревожного внимания к тоскливости дня, он прожил его раздражительно и печально: его как бы позвал кто-то, но он забыл, кто и куда.

Под вечер он уселся в каюте, взял книгу и долго возражал автору, делая на полях заметки парадоксального свойства. Некоторое время его забавляла эта игра, эта беседа с властвующим из гроба мертвым. Затем, взяв трубку, он утонул в синем дыме, живя среди призрачных арабесок, возникающих в его зыбких слоях. Табак страшно могуч; как масло, вылитое в скачущий разрыв волн,

saltantan disŝiraĵon de ondoj, mildigas ilian furiozon, same efikas ankaŭ tabako: mildigante incitiĝon de emocioj, ĝi malaltigas ilin je kelkaj gradoj; ili sonas pli glate kaj muzike. Tial la sopiro de Gray, perdinte finfine post tri pipoj agreseman karakteron, transiris en mediteman distriĝemon. Tia stato daŭris ankoraŭ ĉirkaŭ horon; kiam malaperis la anima nebulo, Gray rekonsciiĝis, ekdeziris moviĝon kaj eliris sur la ferdekon. Estis plena nokto; ekster la ŝipo en dormo de la nigra akvo dormetis steloj kaj lumoj de la mastaj lanternoj. Varma, kiel vango, aero odoris per maro. Gray levis la kapon, mallarĝigis la okulojn al ora braĝo de stelo; momente tra kapturnaj mejloj penetris en liajn pupilojn fajra pinglo de la fora planedo. Obtuzo bruo de la vespera urbo estis atinganta la aŭdon el profundo de la golfo; fojfoje kun vento laŭ la sentema akvo enflugadis borda frazo, dirita kvazaŭ sur la ferdeko; klare soninte, ĝi estingiĝadis en knarado de rigilaro; sur la teŭgo ekbrilis alumeto, priluminte fingrojn, rondajn okulojn kaj lipharojn. Gray fajfis; la fajro de la pipo movetiĝis kaj eknaĝis al li; baldaŭ la ŝipestro ekvidis en mallumo la manojn kaj la vizaĝon de la vaĉanto.

— Diru al Letiko, — diris Gray, — ke li veturos kun mi. Li prenu fiŝkaptilojn.

Li malleviĝis en boaton, kie atendis dum ĉirkaŭ dek minutoj. Letiko, lerta, iom friponema junulo, brue frapinte per la remiloj la flankon de la boato, donis ilin al Gray; poste li malleviĝis mem, ordigis la remilingojn kaj ŝovis sakon kun provianto en la poŭpon de la boato. Gray eksidis al la rudro.

— Kien vi ordonas navigi, ŝipestro? — demandis Letiko, rondirigante la boaton per la dekstra remilo.

La ŝipestro silentis. La matroso sciis, ke en tiun silenton oni ne rajtas enmeti eĉ vorton, kaj tial, eksilentinte mem, komencis forte remi.

Gray prenis kurson al la alta maro, poste komencis teni sin ĉe la maldekstra bordo. Al li estis tutegale, kien navigi. La rudro obtuze lirladis; tintadis kaj plaŭdadis la remiloj, ĉio cetera estis maro kaj silento.

Dum tago homo atentis tioman multon da pensoj, impresoj, paroloj kaj vortoj, ke ĉio ĉi povus konsistigi plurajn dikajn librojn. La vizaĝo de la tago ricevas certan esprimon, sed Gray hodiaŭ vane rigardis en tiun vizaĝon. En ties malklaraj trajtoj lumis unu el tiuj emocioj, kiaj multas, sed ne havas nomon. Kiel ajn nomu ilin, ili restos por ĉiam ekster vortoj kaj eĉ nocioj, similaj al sugesto de aromo. Sub potenco de tia emocio estis nun Gray; kvankam li povus diri: «Mi atendas, mi vidas, mi baldaŭ ekscios...», — sed

смиряет их бешенство, так и табак: смягчая раздражение чувств, он сводит их несколькими тонами ниже; они звучат плавнее и музыкальнее. Поэтому тоска Грэя, утратив наконец после трех трубок наступательное значение, перешла в задумчивую рассеянность. Такое состояние длилось еще около часа; когда исчез душевный туман, Грэй очнулся, захотел движения и вышел на палубу. Была полная ночь; за бортом в сне черной воды дремали звезды и огни мачтовых фонарей. Теплый, как щека, воздух пахнул морем. Грэй, поднял голову, прищурился на золотой уголь звезды; мгновенно через умопомрачительность миль проникла в его зрачки огненная игла далекой планеты. Глухой шум вечернего города достигал слуха из глубины залива; иногда с ветром по чуткой воде влетала береговая фраза, сказанная как бы на палубе; ясно прозвучав, она гасла в скрипе снастей; на баке вспыхнула спичка, осветив пальцы, круглые глаза и усы. Грэй свистнул; огонь трубки двинулся и поплыл к нему; скоро капитан увидел во тьме руки и лицо вахтенного.

— Передай Летике, — сказал Грэй, — что он поедет со мной. Пусть возьмет удочки.

Он спустился в шлюп, где ждал минут десять. Летика, проворный, жуликоватый парень, загремев о борт веслами, подал их Грэю; затем спустился сам, наладил уключины и сунул мешок с провизией в корму шлюпа. Грэй сел к рулю.

— Куда прикажете плыть, капитан? — спросил Летика, кружа лодку правым веслом.

Капитан молчал. Матрос знал, что в это молчание нельзя вставлять слова, и поэтому, замолчав сам, стал сильно грести.

Грэй взял направление к открытому морю, затем стал держаться левого берега. Ему было все равно, куда плыть. Руль глухо журчал; звякали и плескали весла, все остальное было морем и тишиной.

В течение дня человек внимает такому множеству мыслей, впечатлений, речей и слов, что все это составило бы не одну толстую книгу. Лицо дня приобретает определенное выражение, но Грэй сегодня тщетно вглядывался в это лицо. В его смутных чертах светилось одно из тех чувств, каких много, но которым не дано имени. Как их ни называть, они останутся навсегда вне слов и даже понятий, подобные внушению аромата. Во власти такого чувства был теперь Грэй; он мог бы, правда,

eĉ tiuj vortoj egalas al nenio pli, ol apartaj desegnaĵoj rilate de arkitektura koncepto. En tiuj ideoj estis ankoraŭ forto de hela ekscito.

Tie, kie ili navigis, maldekstre per onda densiĝo de mallumo videblis la bordo. Super ruĝa vitro de fenestroj flugis fajreroj de fumtuboj; tio estis Kaperno. Gray aŭdis insultadon kaj bojadon. Lumoj de la vilaĝo estis rememorigantaj pri forna pordeto, trabulinta per truetoj, tra kiuj videblas flamanta karbo. Dekstre estis la oceano, evidenta, kiel ĉeesto de dormanta homo. Preterinte Kapernon, Gray turnis al la bordo. Ĉi tie la akvo estis malrapide leviĝanta; lumiginte la lanternon, li ekvidis kavojn de la deklivo kaj ties suprajn, pendantajn elstarajojn; tiu loko ekplaĉis al li.

— Ĉi tie ni fiŝkaptos, — diris Gray, frapante la ŝultron de la remanto.

La matroso eligis nedifinitan sonon.

— Unuafoje mi navigas kun tia ŝipestro, — murmuris li. — La ŝipestro estas bona, sed malsimila. Komplika ŝipestro. Tamen, mi ŝatas lin.

Enpikinte la remilon en ŝlimon, li alligis al ĝi la boaton, kaj ili ambaŭ leviĝis supren, grimpante laŭ ŝtonoj, elsaltantaj el sub la genuoj kaj kubutoj. De la deklivo estis etendiĝanta arba densejo. Aŭdiĝis frapado de hakilo, forsekcanta sekan trunkon; faliginte la arbon, Letiko aranĝis lignofajron sur la deklivo. Ekmoviĝis ombroj kaj flamo, reflektita de la akvo; en retiriĝinta obskuro iĝis prilumitaj herbo kaj branĉoj; super la lignofajro tremis, brilante, aero, ĉirkaŭvolvita per fumo.

Gray eksidis ĉe la lignofajro.

— Jen, — diris li, etendante botelon, — drinku, Letiko, kamarado, je la sano de ĉiuj sobruoloj. Interalie, vi prenis ne la kininan, sed la zingibran.

— Pardonu, ŝipestro, — respondis la matroso, restarigante la spiradon. — Permesu al mi almanĝi per tio... — Li forronĝis tutan duonon de kokido kaj, elpreninte el la buŝo la flugileton, daŭrigis: — Mi scias, ke vi ŝatas la kininan. Sed estis mallume, kaj mi hastis. Zingibro, vidu, kruebligas homon. Kiam mi bezonas interbatiĝi, mi drinkas zingibran likvoron. — Dum la ŝipestro manĝis kaj drinkis, la matroso ĵetadis oblikvajn rigardojn al li, poste, ne deteninte sin, diris: — Ĉu estas vero, ŝipestro, kion oni diras, ke vi devenas el nobela familio?

— Tio estas ne interesa, Letiko. Prenu la fiŝkaptilon

сказать: — "Я жду, я вижу, я скоро узнаю ...", — но даже эти слова равнялись не большему, чем отдельные чертежи в отношении архитектурного замысла. В этих веяниях была еще сила светлого возбуждения.

Там, где они плыли, слева волнистым сгущением тьмы проступал берег. Над красным стеклом окон носились искры дымовых труб; это была Каперна. Грэй слышал перебранку и лай. Огни деревни напоминали печную дверцу, прогоревшую дырочками, сквозь которые виден пылающий уголь. Направо был океан, явственный, как присутствие спящего человека. Миновав Каперну, Грэй повернул к берегу. Здесь тихо прибывало водой; засветив фонарь, он увидел ямы обрыва и его верхние, нависшие выступы; это место ему понравилось.

— Здесь будем ловить рыбу, — сказал Грэй, хлопая гребца по плечу.

Матрос неопределенно хмыкнул.

— Первый раз плаваю с таким капитаном, — пробормотал он. — Капитан дельный, но непохожий. Загвоздистый капитан. Впрочем, люблю его.

Забив весло в ил, он привязал к нему лодку, и оба поднялись вверх, карабкаясь по выскакивающим из-под колен и локтей камням. От обрыва тянулась чаща. Раздался стук топора, ссекающего сухой ствол; повалив дерево, Летика развел костер на обрыве. Двинулись тени и отраженное водой пламя; в отступившем мраке высветились трава и ветви; над костром, перевитый дымом, сверкая, дрожал воздух.

Грэй сел у костра.

— Ну-ка, — сказал он, протягивая бутылку, — выпей, друг Летика, за здоровье всех трезвенников. Кстати, ты взял не хинную, а имбирную.

— Простите, капитан, — ответил матрос, переводя дух. — Разрешите закусить этим... — Он отгрыз сразу половину цыпленка и, вынув изо рта крылышко, продолжал: — Я знаю, что вы любите хинную. Только было темно, а я торопился. Имбирь, понимаете, ожесточает человека. Когда мне нужно подраться, я пью имбирную. Пока капитан ел и пил, матрос искоса поглядывал на него, затем, не удержавшись, сказал: — Правда ли, капитан, что говорят, будто бы родом вы из знатного семейства?

— Это не интересно, Летика. Бери удочку и лови,

kaj kaptu, se vi deziras.

— Kaj vi?

— Ĉu mi? Mi ne scias. Eble. Sed... poste. Letiko malvolvis la fiŝkaptilon, aldirante per versoj, en kio li estis majstro, por granda admiro de la ŝipanaro: — El ŝnureto kaj bastono elfariĝis longa vip', almetinte hokon fine, longe fajfis mi per lip'. — Poste li tiklis per la fingro vermojn en la skatolo. — Tiu verm' en tero vagis, vivo pasis kun plezur', sed sur hokon fine trafis, kaj formanĝos ĝin silur'.

Finfine, li foriris kun kantado: — Nokt' silentas, brando belas, sturgoj preĝas al Fortun', kaj haringo time svenas — kaptas ja Letiko nun!

Gray ekkuŝis ĉe la lignofajro, rigardante al la akvo, reflektanta la fajron. Li pensis, sed sen partopreno de la volo; en tiu stato la penso, distre tenante la ĉirkaŭaĵon, malklare vidas ĝin; ĝi kuras, simile al ĉevalo en densa homamaso, dispremante, dispuŝante kaj haltigante; vakuo, tumulto kaj prokrasto alterne akompanas ĝin. Ĝi vagas en la animo de la aĵoj; de intensa emocio ĝi hastas al sekretaj aludoj; ĝi rondiras laŭ la tero kaj la ĉielo, vive konversacias kun imagataj personoj, estingas kaj ornamas rememorojn. En tiu nuba moviĝo ĉio estas viva kaj kontrasta, kaj ĉio estas malkonsekvenca, kiel deliro. Kaj ofte ridetas la ripozanta konscio, vidante, ekzemple, kiel en meditojn pri la sorto subite venas gaste tute malkonvena imago: iu vergeto, rompita antaŭ du jaroj. Tiel pensis ĉe la lignofajro Gray, sed estis «ie» — ne ĉi tie.

La kubuto, per kiu li apogis sin, subtenante per la mano la kapon, malsekiĝis kaj rigidiĝis. Pale lumis la steloj, la obskuron plifortigis antaŭmatena streĉo. La ŝipestro komencis ekdormi, sed ne rimarkis tion. Li ekdeziris drinki, kaj etendis la manon al la sako, malligante ĝin jam en sonĝo. Poste li ĉesis sonĝi; sekvaj du horoj estis por Gray ne pli longaj ol tiuj sekundoj, dum kiuj li klinis la kapon sur la manojn. Dum tiu tempo Letiko aperadis ĉe la lignofajro dufoje, fumadis kaj rigardadis pro scivolemo en buŝojn de kaptitaj fiŝoj — kio estas tie? Sed tie, memkompreneble, estis nenio.

Vekiĝinte, Gray por momento forgesis, kiel li trafis en tiun ĉi lokon. Kun mirego vidis li la feliĉan brilon de la mateno, la deklivon de la bordo inter tiuj branĉoj kaj la flamantan bluan foron; super la horizonto, sed samtempe ankaŭ super liaj piedoj pendis folioj de avelujo. Malsupre de la deklivo — kun impresio, ke ĝuste sub la dorso de Gray — siblis mallaŭta surfo. Glitinte de sur folio, rosa guto disfluis

если хочешь.

— А вы?

— Я? Не знаю. Может быть. Но... потом. Летика размотал удочку, приговаривая стихами, на что был мастер, к великому восхищению команды: — Из шнурка и деревяшки я изладил длинный хлыст и, крючок к нему приделав, испустил протяжный свист. — Затем он пощекотал пальцем в коробке червей. — Этот червь в земле скитался и своей был жизни рад, а теперь на крюк попался — и его сомы съедят.

Наконец, он ушел с пением: — Ночь тиха, прекрасна водка, трепещите, осетры, хлопнись в обморок, селедка, — удит Летика с горы!

Грэй лег у костра, смотря на отражавшую огонь воду. Он думал, но без участия воли; в этом состоянии мысль, рассеянно удерживая окружающее, смутно видит его; она мчится, подобно коню в тесной толпе, давя, расталкивая и останавливая; пустота, смятение и задержка попеременно сопутствуют ей. Она бродит в душе вещей; от яркого волнения спешит к тайным намекам; кружится по земле и небу, жизненно беседует с воображенными лицами, гасит и украшает воспоминания. В облачном движении этом все живо и выпукло и все бессвязно, как бред. И часто улыбается отдыхающее сознание, видя, например, как в размышление о судьбе вдруг жалуется гостем образ совершенно неподходящий: какой-нибудь пруттик, сломанный два года назад. Так думал у костра Грэй, но был "где-то" — не здесь.

Локоть, которым он опирался, поддерживая рукой голову, просырал и затек. Бледно светились звезды, мрак усилился напряжением, предшествующим рассвету. Капитан стал засыпать, но не замечал этого. Ему захотелось выпить, и он потянулся к мешку, развязывая его уже во сне. Затем ему перестало сниться; следующие два часа были для Грэя не долее тех секунд, в течение которых он склонился головой на руки. За это время Летика появлялся у костра дважды, курил и засматривал из любопытства в рот пойманным рыбам — что там? Но там, само собой, ничего не было.

Проснувшись, Грэй на мгновение забыл, как попал в эти места. С изумлением видел он счастливый блеск утра, обрыв берега среди этих ветвей и пылающую синюю даль; над горизонтом, но в то же время и над его ногами висели листья орешника. Внизу обрыва — с впечатлением, что под самой спиной Грэя — шипел тихий прибой. Мелькнув с листа, капля росы растеклась по сонному лицу холодным шлепком. Он

laŭ la dormema vizaĝo per malvarma frapo. Li ekstaris. Ĉie jubilis lumo. La malvarmiĝinta braĝo de la lignofajro estis kroĉiĝanta al la vivo per maldika strieto de fumo. Ties odoro donis al la plezuro spiri per la aero de arbara verdaĵo sovaĝan ĉarmon.

Letiko forestis; li absorbiĝis; li, ŝvitinte, estis fiŝkaptanta kun entuziasmo de pasia ludanto. Gray eliris el la densejo en arbustaron, disĵetitan laŭ la deklivo de la monteto. Fumis kaj brulis herbo; humidaj floroj aspektis kiel infanoj, perforte lavitaj per malvarma akvo. La verda mondo spiris per sennombraj etaj buŝoj, malhelpante al Gray pasi inter sia jubilanta denso. La ŝipestro elgrimis sur malfermitan lokon, prikreskitan de bunta herbo, kaj ekvidis ĉi tie dormantan junulinon.

Li singarde forŝovis per la mano branĉon kaj haltis kun sento de danĝera trovaĵo. En distanco de ne pli ol kvin paŝoj, volviĝinte, alfleksinte unu kruron kaj etendinte la alian, kuŝis per la kapo sur la komforte submetitaj manoj la laca Assol. Ŝiaj haroj malordiĝis; ĉe la kolo malagrafiĝis butono, malferminte blankan kaveton; la disĵetiĝinta jupo nudigis la genuojn; la okulharoj dormis sur la vango, en ombro de la delikata, elstaranta tempio, duonfermita de malhela buklo; la etfingro de la dekstra mano, kiu estis sub la kapo, alfleksiĝis al la nuko. Gray ekkaŭris, rigardante en la vizaĝon de la knabino de malsupre, kaj ne suspektis, ke li similas al la faŭno el la pentraĵo de Arnaldo Böcklin.

Probable, en aliaj cirkonstancoj tiu knabino estus rimarkita de li nur per la okuloj, sed ĉi tie li alie ekvidis ŝin. Ĉio ekmoviĝis, ĉio ekridetis en li. Certe, li konis nek ŝin, nek ŝian nomon, nek, des pli, kial ŝi ekdormis sur la bordo, sed li estis tre kontenta pri tio. Li ŝatis bildojn sen klarigoj kaj subskribaĵoj. Impreso de tia bildo estas nekompareble pli forta; ĝia enhavo, ne ligita per vortoj, iĝas senlima, konfirmante ĉiujn konjektojn kaj pensojn.

Ombro de foliaro alŝoviĝis pli proksime al la trunkoj, sed Gray plu sidis en la sama maloportuna pozo. Ĉio dormis sur la junulino: dormis la malhelaj haroj, dormis la robo kaj la faldoj de la robo; eĉ herbo apud ŝia korpo, ŝajnis, ekdormetis pro simpatio. Kiam la impreso iĝis plena, Gray eniris en ĝian varman subkaptantan ondon kaj fornaĝis kun ĝi. Jam delonge Letiko estis krianta: «Ŝipestro, kie vi estas?» — sed la ŝipestro ne aŭdis lin.

Kiam li finfine ekstaris, inklino al neordinaraĵoj kaptis lin subite kun decidemo kaj inspiro de incitita virino. Penseme cedante al ĝi, li demetis de sur sia fingro

vстал. Везде торжествовал свет. Остывшие головни костра цеплялись за жизнь тонкой струей дыма. Его запах придавал удовольствию дышать воздухом лесной зелени дикую прелесть.

Летика не было; он увлекся; он, вспотев, удил с увлечением азартного игрока. Грэй вышел из чащи в кустарник, разбросанный по скату холма. Дымилась и горела трава; влажные цветы выглядели как дети, насильно умытые холодной водой. Зеленый мир дышал бесчисленностью крошечных ртов, мешая проходить Грэю среди своей ликующей тесноты. Капитан выбрался на открытое место, заросшее пестрой травой, и увидел здесь спящую молодую девушку.

Он тихо отвел рукой ветку и остановился с чувством опасной находки. Не далее как в пяти шагах, свернувшись, подобрал одну ножку и вытянув другую, лежала головой на уютно подвернутых руках утомившаяся Ассоль. Ее волосы сдвинулись в беспорядке; у шеи расстегнулась пуговица, открыв белую ямку; раскинувшаяся юбка обнажала колени; ресницы спали на щеке, в тени нежного, выпуклого виска, полузакрытого темной прядью; мизинец правой руки, бывшей под головой, пригнулся к затылку. Грэй присел на корточки, заглядывая девушке в лицо снизу и не подозревая, что напоминает собой фавна с картины Арнольда Беклина.

Быть может, при других обстоятельствах эта девушка была бы замечена им только глазами, но тут он иначе увидел ее. Все стронулось, все усмехнулось в нем. Разумеется, он не знал ни ее, ни ее имени, ни, тем более, почему она уснула на берегу, но был этим очень доволен. Он любил картины без объяснений и подписей. Впечатление такой картины несравненно сильнее; ее содержание, не связанное словами, становится безграничным, утверждая все догадки и мысли.

Тень листы подобралась ближе к стволам, а Грэй все еще сидел в той же малоудобной позе. Все спало на девушке: спал;! темные волосы, спало платье и складки платья; даже трава поблизости ее тела, казалось, задремала в силу сочувствия. Когда впечатление стало полным, Грэй вошел в его теплую подмывающую волну и уплыл с ней. Давно уже Летика кричал: — "Капитан. где вы?" — но капитан не слышал его.

Когда он наконец встал, склонность к необычному застала его врасплох с решимостью и вдохновением раздраженной женщины. Задумчиво уступая ей, он

